

# Senŝtata Revuo



En demokratia reĝimo la Gazetaro estas la plej potenca regilo.

Organo de la Tutmonda Laboristaro

Antaŭe Esperantista Laboristo

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 300 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol. Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKĈIO: E. LANTY

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: L. GLODEAU

177, Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)

## La spirita vivo de nia presorgano

*Unue vivi due filozofii.*

Tiel longe ĝis ni devis precipe zorgi pri la materia vivo de nia gazeto ni ne povis, kiel estus dezirinde, sufiĉe atentigi pri ĝia spirita vivo. Hodiaŭ la unua zorgo lasas nin trankvila. Ni do povas konsideri kiel ni faros el nia revuo pli kaj pli taŭgan kaj altvaloran ilon je la servo de nia idealo. Tiu temo certe interesas nian tutan legantaron, tial mi submetas al ĉies juĝo kelkajn konsiderojn pri la temo.

La poresperantaj varbistoj ofte diras, ke nia lingvo ebligas, ke oni ricevu ŝatindajn informojn kaj dokumentojn pri la politika kaj ekonomia situacio en iu ajn lando. Ĉu vere? Eble. Tamen ni devas konfesi, ke malofte ni havas okazon liveri valoran materialon kiel pruvon de niaj asertoj.

Kial?

Ĝis nun preskaŭ ĉiuj kamaradoj elspesis sian tutan energion en la porvarba propagando; aliaj, kiel delegitoj de U. E. A., en liverado de informoj al komercistoj aŭ al diversaj kolektantoj. Unuvorte la porpraktika uzo de esp-o en revoluciaj rondoj restis kaosa, seninterliga, ofte sencela. Tial la tasko de S. A. T. kaj de ĝia oficiala organo estu kunligi kaj adapti ĉiujn disajn fortojn, kiuj serĉas taskon al kiu, sen perfido de siaj klasaj interesoj, ili povos dediĉi sian energion.

Ni do larĝtrajte ekzameni kiel ni povos fari el S. R. fonton kie niaj legantoj ĉerpos valoran dokumentaron.

Unue ni notu, ke monata revuo ne povas esti informhava pri aktualaĵoj; ĝi povas esti nur dokumenthava, t. e. enteni studaĵojn, tradukindaj por naciaj gazetoj.

Ĝeneralmaniere ni ĉiuj estas tre nesciantaj pri eksterlando. Mil faktoj kiuj iafaje ŝajnas signifikaj por enlandano estas kontraŭe tre interesaj por eksterlandano. Kiam iu skribas pri sia lando li ĉiam pensu pri kio li deziras scii el eksterlando, tiel li havos jam ian direktilon.

\* \* \*

Sed nia movado estas ankoraŭ tre malriĉa je anoj verkopablaj. Tradukemuloj de literaturo ne mankas, sed objektivaj raportistoj estas malmultaj. Por la sukceso de nia movado estas nepre necese tamen, ke ni trovu tiajn. Iĝeblece ili certe jam troviĝas en S. A. T.-anaro.

En la Statuto de S. A. T. estas dirite: "... c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiamaniere, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj..." Ni do klopodu zorgeme plenumi tiun punkton el nia Statuto.

Estas rimarkeble, ke ĉe multaj grupoj oni kunvenas plej ofte por babilo pri bagateloj, aŭ pri la porvarba agado. Oni ankaŭ emas imitaĉi la burĝajn grupojn per organizo de festoj kaj diversaj amuzajoj<sup>(1)</sup>. Sed rilate al la porpraktika uzo de esp-o estas malmulto farata. Oni ne sufiĉe komprenis kia potenco edukilo, klerigilo povas esti la serioza utiligo de internacia lingvo.

Ĉiuj S. A. T.-grupoj devas nepre instigi siajn membrojn al senĉesa lernado. Bonkamaradeca konkuremo devas estiĝi inter la anoj de la grupo. La internacia korespondado estu farata inteligente, metode. La spertuloj gvidu la komencantojn. Interŝanĝado de poŝtmarkoj ne estu nura temo por korespondado. Oni precipe kutimiĝu observi kun akra spirito; oni penu sufoki ĉiun emon al blufado kaj fanfaron-

(1) Komprenibile mi ne deziras, ke la laboristoj neniam amuziĝu. Mi nur diras, ke la organizado de festoj devas esti nur akcesora flanka afero, kaj ne ĉefa zorgo kiel okazas tro ofte.

ado; oni malmulte parolu pri farotaĵoj sed ĉefe pri efekti-  
vigaĵoj. Ĉiu ano peni tiri moralan kaj klerigan profiton el  
sia korespondado.

El tia utiligo de esp-o kelkaj kamaradoj en ĉiu regiono  
aŭ lando iom post iom akiras verkokapablecon kaj tiel povos  
fariĝi korespondantoj de S. R. aŭ de iu stariginda Centro  
por havigo de raportoj pri ĉiuj landoj.

Sed, de nun, estas necese, ke ĉiuj kamaradoj, kiuj bon-  
volos kunlabori al nia gazeto ekinterrilatigu kun la Redak-  
toro. Kiam estos starigita listo de bonvoluloj li povos  
en oportuna tempo direkti peton pri raporto kun certeco  
ricevi ĝin ankaŭ en oportuna tempo. Estas necese, ke oni  
atendu la peton; aliel povus okazi, ke iumonte li ricevus  
tro da presotaĵo kaj ne povus uzi la tuton.

Mi do insiste petas al ĉiuj ti-kiuj estas pretaj plenumi  
la supre parolitan taskon, ke ili sciigu min.

\* \* \*

En okazo ke kelkaj kamaradoj bezonus ian direktivon  
por verki raporton, mi liveros kelkajn konsilojn kaj ĝeneralajn  
konsiderojn.

Kion bezonas scii nia legantaro? Estas facile respondi,  
se oni atentis pri la celo, jam kelkfoje montrita, de nia  
entrepreno. El ĉiu lando ni bezonas scii:

I<sup>o</sup> *Pri vivkondiĉoj*, a) salajro, b) kosto de vivrimedoj,  
c) senlaboreco, d) labordaŭro, e) kiomeco de infanoj, ktp.

II<sup>o</sup> *Pri ekonomia situacio*: a) ĉefaj industrioj, b) eksport-  
ado, c) importado, d) stato de la fervojaro kaj ŝiparo, ktp.

III<sup>o</sup> *Pri politika kaj laborista movadoj*, a) nombro de  
partioj aŭ organizaĵoj, b) pokoncerna nombro de anoj,  
c) pokoncerna nombro de gazetoj, d) morala kaj intelekta  
valoro de la gvidantoj, ktp.

IV<sup>o</sup> *Religia kaj morala situacioj*, a) eklezioj, b) sektoj,  
c) filozofioj, d) moroj ktp.

V<sup>o</sup> *Literatur-, art-, kleriga movado*, a) skoloj, b) tenden-  
coj, c) gravaj verkoj ktp.

Komprenoble por pentri tian ĝeneralan bildon tio neces-  
igas preskaŭ enciklopedian scion. Sed per opa kunlaborado  
oni povas atingi kontentigan rezultojn. En iu grupo kvar  
aŭ kvin kamaradoj povas ĉiusiaflanke serĉi kaj enketi pri  
la supre menciitaj punktoj. Ekzistas bibliotekoj, kiujn ili  
povas konsulti. En la daŭro de kelkaj monatoj ili povas  
per legado de revuoj kaj ĵurnaloj kolekti materialon por  
verki raporton. Precipe labormetodo mankas al laboristoj.  
Ili ne timu sin turni al klera malsamsideano por peti kon-  
silojn. Proletario ne forgesu, ke li devas kvazaŭ ŝteli scion  
el la burĝa klaso. For la skrupoloj tiukampe! Ekzistas en  
la laboristaro multe da inteligentuloj al kiuj mankas nur  
instiga gvidado por ke ili kleriĝu. Okazas ankaŭ ke ne-  
kleruloj havas pli da juĝkapablo ol kleruloj fieraj je sia  
libreca scio. Sed tio estas alia temo, kaj mi petas pardo-  
non pri tiu deflankiĝo.

Se oni ne kuraĝas entrepreni tian gravan taskon, kia  
estas skizo pri ĝenerala situacio en iu lando, oni almenaŭ  
povu verki monografion pri sia urbo, pri sia regiono. Tio  
ankaŭ estus certe tre interesa.

Interesa ankaŭ estas bildoj kaj desegnaĵoj rilataj al la  
temo pritraktita. Ĉiu do kunlaboru laŭpove, ĉu per sia  
skribilo, ĉu per sia kraĵono, ĉu per sia fotografaparato —  
Neniu estu indiferenta pri la komuna entrepreno. . . .

\* \* \*

Evidente la gazeto ne devas esti plena je raportoj. Ĝi  
ankaŭ estu tribunio por libera diskutado pri doktrino kaj  
taktiko. La dogmaj religioj estu vipataj per trafaj argumentoj.  
La edukado de infanoj estu pritraktata de ĉiuj interesigantoj,  
ne nur de profesiaj instruistoj. Ĉar okazas ofte ke la pro-  
fesiaj malĝustigas la propran juĝkapablon.

Pri la literatura parto ne estas necese insisti: ne man-  
kas en Esperantio poetoj kaj literaturamantoj! . . .

Nia Revuo, nun eliranta 5000 ekzemplere, devas esti  
inda je la graveco de nia legantaro. Sed la kunlaborado  
de ĉiuj kapabluloj estas necesa. La Redaktoro ne povas  
senhelpe interesantigi kaj vivantigi nian presorganon. Oni  
ankaŭ ne forgesu, ke li malŝparas multe da tempo por legi  
manuskriptojn hieroglifskribitajn, aŭ provante rebonigi ar-  
tikolojn senzorge faritajn. Oni ne diru al si, sendante pres-  
otaĵon; "Ho, ne grave se mi faris erarojn, la Redaktoro  
korektos." Nek emon, nek sufiĉan tempon mi havas por tio.

Ĉiu "Satano" estu do konsciencia, solida kaj fidinda  
homo. Tiel *Sennacieca Revuo* akiras karakteron de serioz-  
eco kaj fidindeco; kaj ĝia spirito pli kaj pli altiĝos kaj  
minace ŝvebos super la detruendaj landlimoj. E. Lanty

## 2<sup>a</sup> Kongreso de S. A. T.

sub honora Prezideco de *Romain Rolland*

Frankfurt a. Main (Germanio)

12—16 aŭgusto 1922


6<sup>a</sup> Komuniko

Listo de aliĝoj ricevitaĵ ĝis la 15<sup>a</sup> majo:

- K<sup>do</sup> Alfred von der Heid, Charlottenstr. 11 III, Leipzig  
 „ Christian Meyer, Kernstr. 44 I, Nürnberg (Germ.)  
 „ Leo Kempinski, Rechneigraben 19, Frankfurt a. M.  
 „ Christian Graĉil, Schoene Aussicht 8 II, Frankfurt a. M.  
 „ F. C. Richter, Sommerfelder Str. 44 ptr., Leipzig (Germ.)  
 „ Paul Gedai, Böllbergweg 13, Halle a. d. S., (Germ.)  
 „ Marcel Roux, 10 rue Boileau, Lyon (Fr.)  
 „ Raymond Sweiker, 161 cours Emile Zola, Lyon (Fr.)  
 „ Julien Ollati, 78 rue Magenta, Villeurbanne (Fr.)  
 „ R. Brackel, Christinastr. 31, Köln-Nippes (Germ.)  
 „ Gottlieb Kolb, Dominikanerstr. 1, Worms a. Rh. (Germ.)  
 „ Rudolf Rümer, Kamererstr. 15, Worms a. R. (Germ.)  
 „ Otto Stöber, Humboldtstr. 46, Linz a. D. (Aŭstrio)  
 „ Vladimir Vojda, Oelsweig 5 1/6, Wien (Aŭstrio)  
 „ Henri Pigeon, rue Courtenvaux 4, Le Havre (Fr.)  
 „ Alex. Busam, Isenburgerstr. 8, Cassel (Germ.)  
 „ E. E. Yelland, Aberdeen Road 38, London W. 5  
 K<sup>ino</sup> Hugot Raison, Ecole Cours Jacquin, Troyes (Fr.)  
 F<sup>ino</sup> Marguerite Verpy, Chassericaourt (Fr.)

- K<sup>do</sup> Cap. René, 32 rue au Moine, Troyes (Fr.)  
 „ Marsigny Edouard, 16 rue Paillot de Montabert, Troyes, (Fr.)  
 K<sup>ino</sup> Helene Tasane, poŝtkesto 6 "Espero", Tallin (Estonio)  
 K<sup>do</sup> Ludwig, Dörfel 325 bei Reichenberg (Ĉekosl.)  
 „ Wuttke Hermann, C/O Esperanto-Lab. Centro IW. 34 th.  
 Str. *Nov York* (U.S.A.)  
 en Pilsen (Ĉekosl.) 2 Kamaradoj.  
 Sume: 82 aliĝoj el 13 landoj.

\*



Eschenheima\_Turo\*

Tiu listo entenas nur la K.dojn kiuj jam pagis sian kongreskotizon. Tro multe da aliaj, kiujn ni konas, prokrastas la sendon de sia kotizo; tio estas tre bedaŭrinda, kaj nin tre ĝenas en la prepero de la Kongreso.

*Vivkosto en Frankfurt:* unu ĉambro kun matenmanĝo (kafo kun bulkoj) po nokto: 40 ĝis 80 markoj. — Bona manĝo (sen trinkaĵo): 30 ĝis 40 mk, plus 10% por servado. Ekzistas aliaj restoracioj malpli kostaj.

Cetere ni aranĝos komunan manĝon kies prezo estos atingebla de ĉiuj monujoj.

*Raporto pri la Kongreso:* Ĉiuj paroladoj, diskutoj, voĉdonoj, rezolucioj de la Kongres-kunsidoj estos enregistritaj de niaj Kdoj stenografistoj: Kolb (de Worms a. Rh.) kaj E.E. Yelland (de London).

*Pasporto:* Kelkaj Kamaradoj skribis al ni pri havigo de pasporto. Ni bedaŭrinde povas nenion fari; tiu afero koncernas nur la ŝtatajn oficejojn de la lando de l'petanto.

*Donaco:* Ni ŝuldas apartan dankon al S.A.T. grupo de Kristiania, kiu subvenciis nian kongreskason per 1000 mk. germ. De K<sup>do</sup> B. (Paris) ni ricevis 4 fr. fr.

\*

Sekve de nia alvoko ni ricevis la jenajn proponojn diskutotajn ĉe la Kongreso. Ili rilatas al la nuna statuto (aldono aŭ ŝanĝo)

1) *Propono de la Dresden'a S.A.T. grupo:* En artikolo 2, post la vortoj «kiu, akceptinte tiun ĉi statuton . . . .» aldoni la jenon «. . . . ne estas membro de iu ajn burĝa esperanto-organizaĵo . . . .».

Tio estas necesega, diras la grupo, ĉar «en lasta tempo ni spertis, ke al nia Sato aniĝas, duonburĝuloj kaj tiel nomataj "neŭtralaj", kiuj certe aniĝis pro klara intenco. Ni konsideras tiun ĉi fakton danĝera por nia proletaria esp. organizaĵo.

2) *Propono prezentata de K<sup>do</sup> Deübler (komisiite de la S.A.T.anoj de München kaj Augsburg), Fr. Deiters, Georg Ort, Ferm. Gogolin (por la S.A.T.anoj de Cassel):* . . . En

artikolo 1, sub celo, aldoni la vortojn. «Propagandi, instruadi esperanton».

Motivo de la postulo «S.A.T. grupoj plej efike propagandadas kaj instruadas Esperanton. Do ili tiel zorgas ĉefe por la kreskado de nia anaro. Ĉu tiu laboro en la nuna tempo estas ne same tiom necesa kiom la per-esperanta? Ĉu la laboroj por kaj per esperantaj estas ne tiel interplektitaj, ke divido eĉ estas ne ebla? Ni taksas inde por esti fiksita en la statuto sub "celo" la por-esperantan laboron.



Ariadna, verko de Dannecker, ekspoziciata en la Bethmanna Muzeo

3) *Propono prezentata de K<sup>doj</sup> Deübler, Deiters, Ort, Gogolin kaj Köckeritz.* (tiu ĉi por la grupo de Dresden).

Starigo de "fakoj": fako estas sennacieca grupiĝo de membroj kiuj volas plivigli la rilatojn inter si por esperantistaj aŭ aliaj nekontraŭstatutaj celoj (vidi U.E.A. statuton). Ekz: fakoj de S.A.T.anoj liberpensuloj, naturamikoj fervoĵistoj, k.t.p.

Tiu propono baziĝas sur la konsidero, ke la kreo de "fakoj" malebligos la fondon de tro multe da asocietoj sensignifaj. Aliflanke, la kuniĝo de la S.A.T.anoj en fakojn garantias plibonan plenumon de la taskoj diversaj, per pli da metodo, ordemo, konstanteco. Fine tiu sistemo de fakoj certe pligrandigus la intereson, la valoron de nia Revuo.


Tamen, al tiuj konsideroj la Dresden'a grupo aldonas la jenan frazon «la fakoj laŭ strukturo estu tiaj, ke ili ne povu influi la tutan organizaĵon sennaciecan».

\*

Jen interesa medit- kaj diskut-temo por la membroj de S.A.T. Ne atendu ĝis la Kongreso por pensi pri tiuj proponoj.

La Prezidanto de la Kongres-Komitato

Jean Roth



Alberto Schumanns Cirko-Teatro

## El Usono

Priskribi la situacion de nia fama Dolarlando tiel, ke vi ekvidu ĝian socian fotografajon estas tute neeble, pro la haoso kiu regadas nun en la tuta mondo, ne esceptinte Usonon.

La sola afero do estas ke ĉiu homo kun dolarbileto, senrigarde ĉu papera aŭ arĝenta, povas aĉeti nuntempe sufiĉe da manĝaĵo por ne morti pro malsato por kelkaj tagoj, eble tri. Sed la luon li el unu dolarbileto ne povas pagi, ĉar en la senŝenca urbego de New York, regas la "Landlords", aŭ laŭvorte tradukite, "la dioj de la tero", kaj laŭsence la domposedantoj. La luo ne nur estas alta sed daŭras altiĝi! Nur manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj luksaĵoj preze pli malaltiĝis.

Sed la plej bedaŭrinda afero estas la malebleco de dolarĝajno, ĉar mankas laboro. Post kiam la eŭropaj fabrikoj, precipe en Germanio, komencis retrovi siajn eksportlandojn, Usono devis fermi sian fabrikaron, escepte kiun ĝi bezonas por hejma produktado. La landa statistiko pravas, ke dum la unuaj monatoj de tiu ĉi jaro ekzistis el ĉiu grupo de 234 gelaboristoj, nur unu cento da laborantaj kaj 134 senokupataj.

Okazis multegaj strikoj, instigitaj eĉ de kapitalistoj por elĵeti la laboristaron el siaj fabrikoj kaj rompi la kontraktojn kun la laboristunuigoj por anstataŭi ilin kun manoj pli malmultkostaj. Plej multe da strikoj okazis pro plialtigo de la salajroj. La plej grandajn strikojn enŝencigis la tekstlaboristaro kaj la karbministaro. Kvankam la unuigoj gajnas multajn novajn geanojn el tio, la strikoj ne donis nek ŝajnas doni ion, por la kontentigo de la strikintaro. Eĉ ĝenerala striko de ministoj ne ŝajnas esti sufiĉe forta por alporti bonon por la laborista klaso! La lasta ilo povas esti nur ĝenerala laboristunuiga striko de almenaŭ ĉiuj interligitaj diversaj fakunuigoj, kaj tio ŝajnas esti la sola revolucio ebla en Usono, ĉar estas nuntempe preskaŭ ok milionoj da gelaboristoj enskribitaj en la laborunuigoj, el kiuj, ve, multaj estas patriotoj, multaj ankaŭ apartenas al religioj, kie ili lernis, ke dio benis la riĉulojn en tiu ĉi forpasanta mondo, dum ili, la mizeruloj heredos la feliĉan regionon de la paradizo, se ili ne pekos tie ĉi! Sed malsatado povas esti multfoje pekigilo.

La tuta Usono povas aparteni al preskaŭ unu milo da riĉuloj dum el tiuj eble tri dekduoj estas la kondukantoj kaj posedantoj de la granda industrio, kiuj ree decidis inter si, kia dekduo regu la landon. Oni povas aŭdi nun tiajn regantajn nomojn: Rockefeller, Morgan, Mellon, Ford, Mo. Cormick, Vanderbilt, kaj kelkaj aliaj, ne tiel gravaj, kiuj estas la plej riĉaj personoj en la mondo. Ili do malaprobis la planojn de unu el la menciitaj, nome Henri Ford en Detroit. Li riĉiĝis el aŭtomobiloj. Sed li estas la sola el ili, kiu ne apartenas al iu eklezio kaj enkondukis jam delonge antaŭ la milito la okhoran labortagon kun la minimuma tagpago de kvin dolaroj por sia grandamasa laboristaro. Li do volis dum la milito haltigi la militon per senarmigo kaj resendo de la militantoj al siaj hejmoj por la kristnaska aŭ novjara festo! Pro tio ĉiuj gazetoj kapitalistaj ridindigis lin. Post lia malsukceso li eldonis gazeton per kiu li atakis la hebreojn, la judojn kaj izraelidojn. La lastaj regas parte en la financa mondo, kies hejmo estas la novjorka Wall-strato, kaj Henri Ford demandinte tie krediton de nur 30 milionoj da dolaroj trafis rifuzon, kaj ree li atakadas tiujn ĉi gentojn, kiuj dum kvar mil jaroj ne volis forĵeti la religion de siaj prapatroj, kaj pro tio, image estis suferantaj. Sed Ford, trovis aliloke la sumon kaj profitadis tiom da mono, ke li malaltiĝis la prezon de sia aŭtomobilo al prezo antaŭmilita kaj altiĝis la minimuma tagpagon al ses dolaroj, ŝanĝinte la laborsemajnon de ses en nur kvin tagojn! Tiamaniere liaj laboristoj, pli multe ol 36 mil, ĝuas du tagojn da

ripozo en la semajno je la sama salajro. Ie en Irlando li havis fabrikon, kiun li fermis pro la ĉiama plialtigo de impostoj kaj aliaj aferoj neplaĉaj al li. Ford havas sian propran planon por la savo de la homaro, kiu estas ankaŭ kapitalista, sed la aliaj kapitalistoj ne volas kredi tion.

La sama Ford aĉetis ankaŭ la bankrotan Lincoln-Aŭtomobilfabrikon por ok milionoj da dolaroj, por savi la amikon de lia edzino. Per tio li ankaŭ helpis la tian laboristaron, kiun li metis sur la sama bazo de pago, kiel la propran. — Post tio li volis aĉeti tre grandan pecon el la lando, nomita Muscle Shoals, kiu apartenas al usona registaro sed li ne sukcesis havigi ĝin pro la politikistoj en Washington. Lia ideo estis starigi fabrikojn de ĉiuj specoj ankaŭ hemiajn, kaj havi tie Laborlandon, homojn kiuj vivas el laboro kontrolita de li.

La granda surpluso de fremda ormono en Usono kaj la falanta eksportkomerco tie ĉi igis la registaron aŭdi la eŭropajn registarojn, kiuj petis kaj petegadis Usonon helpi ilin. Washingtona registaro simple lasis alveni la delegitaron de kelkaj landoj por trovi reguligon. Ili alvenis kaj la gazetoj prikantis ilian elokventecon de paolado, sed la franca delegitaro ne volis aŭdi pri la redukto de siaj armeoj ĉu surmare aŭ surtere. La usona popolo ne ŝatas militon, kiel la militamaj francoj aŭ prusoj aŭ aliaj eŭropaj batemuloj, tial la registaro ne povis decidi kion fari, kaj la plej agrablan kion la usona registaro povis fari, estis lasi la eŭropanojn mem reguligi siajn aferojn, sen usona intermiksado. La nova prezidanto Harding, ne ŝatas sin intermiksi en iu ajn afero komplikata, ĉu financa, politika aŭ milita. Li apartenas al iu sankta eklezio protestanta, kaj ŝatas teni siajn manojn interfingre kunigitajn.

Sed dum la ĉeestado de la fremda delegitaro okazis unu hipokrita afero, tiu de la metodista pastro, kiu devis beni la malfermon de la kunveno. Li estis devigita preĝi por la sukcesigo de la afero sen menci i la nomojn de Jesuo Kristo kaj sankta spirito aŭ sankta patro, pro la ĉeestintaj idoloj el Hindujo kaj Japanio kaj pro la liberpensuloj el Italio kaj kelkaj aliaj eŭropaj landoj! Pro tio la kristana gazetistaro atakis la hipokritecon de la pekinta pastro.

El tio oni povas vidi, ke la eŭropanoj alvenis kun malplenaj manoj, farinte ŝuldojn por sia vojaĝo sur la dorso de sia propra kunlandanaro. Do ili estis gastigitaj bone kaj ne forgesis menci i en siaj gazetoj ke la ŝtatestretario Hughes (legu: juz) manĝis ĉiun tagon du porciojn da ŝinko kun ovaĵo, por povi paroli la tutan tagon! Post ilia foriro ili kunvenis en Cannes kaj decidis alvoki konferencon en Ĝenovo. La gazetoj priskribas ĉion kaj la usona popolo sin amuzas multe pri ilia buŝbatalo. La afero ŝajnas esti simila al kunveno de almozpetuloj, kiuj deziras dividi inter si la landojn en kiuj ĉiu grupo estas permesata, almozpetadi! Se ne tion, oni pripensas la saman rakonton pri rabistoj. Ĝenovo ŝajnas esti fiasko. Morgan, la bankisto mem, devas iri Eŭropon por gardi la reguligon de aferoj, ke li ne perdu monon, kiun li pruntedonis al Londono kaj Parizo. Ĉiuj eŭropaj registaroj jam serĉadis tie ĉi novajn kreditojn, kelkaj ricevis ĝin jam, sed ŝajnas ke ne sufiĉas por ili, ĉar oni ne povas vidi la plivalorigon de ilia mono, krom Svislando kaj Nederlando.

Nur unu aferon ne scias la Francoj: estas, ke en Usono loĝas multaj riĉuloj el iama germana gento, kiuj estis pretaj monhelpi Germanujon, tuj kiam ili povos vidi, ke la germana marko plivaloriĝas. Kaj aliparte ekzistas ankaŭ veraj Jenki (Usonanoj de pli ol tri generacioj en la lando) tre riĉaj kiuj posedas fabrikojn en Germanujo, precipe de tukfarado kaj de trikotajoj, ĉar ili sendas la krudan kotunon tien, por ĝin tute artikligi tie, pro la malmulta kosto de germana laboro. Jam niaj kapitalistoj elkalulis ke germana laboro egalas preskaŭ tiun de la fina! Pro tio Germanujo havas multajn amikojn en Usono inter kapitalistoj kaj la laboristaro mem ne deziras eniri ian militon, eĉ ne tian por si mem.

Estas tre notinda afero sciigi la Eŭropanaron kiamaniere la penspovo de usona popolo progresas. En la XV-a volumo de la "Memoirs of the National Academy of Sciences" troviĝas raporto pri la psihologia ekzamenado de la Usona armeo por la jaro 1921, de Robert M. Yerkes el la oficejo de la ĉefmilitkuracistaro. Li klare konstatas ke ekzistis preskaŭ 48% da soldatoj, kiuj estas analfabetoj<sup>(1)</sup> kaj pli granda estas la nombro kies cerba komprenkapablo ne egalas tiun de dekdujara knabo!

Nia tuta junularo estas malbonigita per publikaj lernejoj, kie ili estas instigataj malami ĉion fremdan, ĉu homaron ĉu idearon. Tiamaniere multaj infanoj el fremdlandaj familioj iĝas malamiketoj de siaj propraj gepatroj, ankaŭ tiam, se ili vizitas preĝejojn, ĉar la publika lernejo havas pli grandan influon sur ilin. La sola dancado kaj muziko, kiun ili ŝatas estas la sënseca "Jazz" (ĝaz). Per tio ili atingas la 100% amerikanismon, kio signifas ke ĉiu Usonano amu nur Amerikon, kaj obeu la amerikan kapitalistaron. Malgraŭ tio oni povas kun ĝojo konstati ke du usonaj verkistoj Dreisser kaj Mac Neill elverkis du proletariajn dramojn kiel: "La fraŭlino en la ĉerko" kaj "La hara simio", kiuj ambaŭ pleningas la teatrojn.

La reakcio estas granda, ĉar kiel la eklezioj montras en siaj statistikoj, la kristanaro enlanda gajnis 761, 727 novajn anojn por la jaro 1921. — Jes, en la urbo Zion City, ŝtato Illinois, la tuta loĝantaro unuanime voĉdonis, ke la mondo ne estas ronda sed plata, pro kio ili demandas la registaron forĵeti la uzitajn geografiajn librojn kaj terglobojn! Kaj pli reakcia decido ol tiu okazis en la ŝtato Kentucky, kie ili deziras forĵeti ĉiun tian sciencan instruadon, kiu rilatas al la Darvina evolucia teorio. Tiun ĉi decidon oni propagandas ankaŭ nun en la aliaj reakciulaj ŝtatoj en la centro de Usono, kaj eĉ tiel fama persono kiel William Jennings Bryan, la iama multfoja demokrata kandidato por la prezidanteco de Usono, sin metis je la kapo de tiu reakciularo! Bryan estas homo inteligenta, li renkontis Tolstojn kaj ne apogis la militon eĉ ne Wilsonon, kiam tiu lasta decidis eniri militon. Bryan enleĝigis la prohibon (malpermeson de alkoholkomercado) per helpo de Wilson, kio krom aliaj eraroj de Wilson, resendis Wilsonon en sian hejmangulon por pripensadi sian fuŝverkon. Sed Bryan estas politikisto, kaj ree deziras montriĝi sur la prezidentkandidatan videlejon. Li preferas la biblion vidi en la lernejoj anstataŭ la sciencan!

Politike oni devas mencii, ke la socialista prezidantkandidato Eugene Debs, estas liberigita, dum multaj aliaj I.W.W.-anoj ankoraŭ sidas en la malliberejoj pro siaj kontraŭmilitaj ideoj. Ili nun parolas pri la liberigo de Tom Mooney kaj Warren C. Billings, ankaŭ pri Gitlov kaj James Larkin; tiu lasta ŝajnas esti danĝera por la irlanda kapitalistaro. — Aperis ankaŭ dek artikoloj de la fama Emma Goldman en la "The World" kontraŭ la bolŝevika registaro por kiuj ŝi ricevis nekonatan sumon da mono kaj pro la bona anoncado de tiu gazeto, unu el plej grandaj, la "World" multfoje pli ol la verkistino, mongajnadis! La artikoloj plendas pri kelkaj eraroj faritaj dum la transformiĝo sed plej multe pri arestigo kaj malliberigo de anarhiistaj amikoj. Bedaŭrinda estas tiu afero. Emma Goldman estus devinta atendi pli longe antaŭ ol akuzi ion, kio mem nur deziras aŭ eĉ havas povon establiĝi tion, kion la laboristaro celas.

Ankaŭ Geo. Williams de la I.W.W. revenis el Moskvo, eldoninte pamfleton kontraŭ la bolŝevika registaro. Same kiel Emma Goldman, li ne solvas la problemon. Nur unu por ni jam esperantistigitaj laboristoj interesa afero en lia pamfleto troviĝas, la jena: li ĉeestis la trian Internacion kaj plendis pri la malbonaj tradukaĵoj el ruse aŭ france aŭ eĉ germane anglen! Li konstatas ke la tradukistino el la rusa lingvo sciis malpli bone angle ol

Nov-Jorka knabineto el fremdlando, loĝanta tie ĉi ses monatojn! Li diras nur lingvosciistoj kiel rusaj, kiuj konas bone ruse, germane kaj france, kelkaj el ili ankaŭ scias angle, povis bone kompreni la decidojn kaj celojn de la kunvenintoj. Sed nek anglo nek franco zorgas multe pri alia lingvo. Post tiaj gravaj kaj justaj plendoj pri tiu ĉi afero, li tute forgesas solvi la problemon laŭ nia vidpunkto, ĉar nenie en sia libreto li mencias ke per Esperanto, angla kaj franca laboristo povas tre bone interparoladi kaj pridiskutadi la plej gravajn aferojn por la laborista klaso. Tamen Bill Haywood, la iama ĉefgvidanto de la I.W.W. kaj Adreĵcin, la iama sekretario, restis en Rusio tute kontentigitaj, kaj en Marto foriris grupo de pli ol 100 anoĵ de la I.W.W. Rusion, provizitaj kun mono kaj iloj!

Aliaj aferoj kapitalistaj estas la kontraŭleĝa ŝtelistaro kiu tre multe pligrandigis. Pro tio la tuta Wall-strata distrikto de kelka tempo portadas armilojn kun si. Eble tio estis nur pretenda afero, ĉar la popolo ne povas kompreni, kiel la usona registaro post ĉiu deziro havi pacon, pligrandigas sian armeon nun per novaj 86 miloj da viroj?! Tio rilatas al New-York.

Sed alvenis la tago de la unua de majo, kiam ili estas bonege preparitaj por surprizi la laboristaron, se ekzistas inter la lasta la spirito de revolucio. La laboristaro sin dividis kaj marŝadis en diversaj grupoj al diversaj lokoj por aŭdi la paroladistojn. Nenio grava okazis. La infanaro de la laboristaro, kiu vizitas la social stajn aŭ aliajn radikalajn dimanĉajn lernejojn kunvenis en bela parto de North Beach por sin amuzi kaj ĝui la solan festegon de la tutmonda laboristaro. Alia novaĵo estas ke alvenis Usonon la fama mortigisto generalo Simionov el Siberio. Li estis bone akceptita en Washingtono, sed alveninte Nov-Jorkon, li havis kelkajn malagrablaĵojn. Li estis rekonita kiel mortigisto kaj oni lin tuj arestigis por transdoni al la juĝistaro. El la malliberejo oni lin lasis foriri ĉar li havis la garantion de 25 mil dolaroj, sed li sidis kelkajn tagojn kaj la popolo demonstraciis kontraŭ tiu ĉi fama krimulo kun kiu vojaĝis lia edzino dum alia edzino de li ankaŭ anoncis akuzon kontraŭ li. Kvankam oficiroj el la usona armeo konvinkis la juĝistaron kaj gazetaron, ke Simionov estas mortigisto de usonaj soldatoj en Siberio, la registaro en Washington opiniis ke New-York ne havas la rajton juĝi gaston, tiel altpozician kaj por aferoj dummilitaj, faritaj en Siberio! Tio devas aparteni al militistara juĝejo kaj ne al civila! — Ŝajnas ke hundo hundon ne mordas ankaŭ en Usono!

La demando pri oficiala akcepto de la bolŝevika registaro estas ĉiam pli aktuala, ne nur ĉe la laborista klaso sed ankaŭ ĉe komercistoj kaj aliaj personoj, precipe ĉe la virinaj asocioj, kiuj demandis Wilson kaj Hughes fari ion por tiu akcepto. Ili do diras ke unue estas necese vidi la rezulton de la Ĝenova konferenco. — La virina politika agado en Usono estas tiel granda, ke ili jam gajnis unu urbeton, en kies urbestaron oni ne elektis eĉ unu viron, sed nur virinojn.

La 31a majo estis la memornaskotago de Walt Whitman, fama poeto kaj filozofo usona, por kiu en multaj urboj okazis festvesperoj kun paroladoj pri tiu ĉi humanisto.

Alia granda okupilo nuntempe interesas la Usonanaron, nova elpensado, la radiofonografio. Ĉie ajn oni nur parolas pri tiu ĉi nova eltrovaĵo, per kiu oni povas interparoli senfadene, aŭdi koncertojn kaj paroladojn en sia propra loĝejo. La ilo jam tiel plimalmultkostiĝis, ke ĉiu persono posedanta daŭran loĝejon povas aĉeti tian por sia propra uzado. La fabrikoj ricevis tiom multe da mendoj ke ili ne povas liveri dum multaj monatoj la ĝisnunan mendaron. En tiu ĉi afero oni pensas jam pri la neceseco de Esperanto!

La gazetaro ankaŭ raportis pri la kongreso de instruistoj el 14 landoj apartenantaj al la Ligo de Nacioj en Ĝenevo, kie la enkondukado de Esperanto en iliajn lernejojn estis priparolita.

(1) Senliterulo. — Red.

Usono ne partoprenas oficiale en Esperantaj aferoj, ĉar ĝi deziras ke oni akceptu la anglan lingvon, kiel la duan, kaj jam en Porto-Rico S<sup>ro</sup> Reilly la reprezentanto de la usona registaro volis anstataŭi la hispanan lingvon per la angla en ĉiuj oficejoj kaj lernejoj. Sed la tiea popolo forpelis tiun tiranon kaj ne volis aŭdi ties intencojn! Post ĉio tio la usona registaro havas do apartan oficejon en Washingtono, por la trastudado de ĉiuj internaciaj lingvoj kiel Esperanto, Ro-Ro, Ido, Esperantido, Europal, k. t. p. kaj ŝajnas ke Esperanto plaĉas al la trastudentoj plej multe. Ĉar Usono ne estas rapida en la akcepto de ideoj pensraciaj, estas necese ke la eŭropaj landoj unue akceptu Esperanton kaj per tio Usono sin ekpretiĝus akcepti ĝin ankaŭ. La samo estas kun la socialistaj kaj literaturaj ideoj. Nur praktikaj eltrovaĵoj meĥanismaj aŭ fizikaj povas tie ĉi ekprogredi, se la eltrovaĵoj estas tute novaj kaj ne kontraŭas la interesojn de ia trusto.

Novulo

## El Rusio

### Konsisto de R.S.F.S.R.

Estinta Rusa Imperio havis en si dekojn da diversaj nacioj, kiujn tiama registaro premegadis kaj penis rusigi. La unua burĝa revolucio malmulte ŝanĝis la situacion de tiuj ĉi popoloj, anstataŭinte nur la caron per nova registaro. Sed venis la sovjeta revolucio kaj tuj proklamis la rajton de memstareco por ĉiu popolo. Pro tio kelkaj apudlimaj kaj pli fortaj nacioj eliĝis en proprajn ŝtatojn. Ekzemple, sovjeta Rusio mem akceptis la memstarecon de Finnlando. Tamen multaj nacioj restis ĉe Rusio, aŭ pro sia situo aŭ pro ekonomiaj kaŭzoj ne povante apartiĝi. Tiam Sovjeta Registaro plej bone solvis la nacian problemon doninte al ĉiuj eĉ malgrandaj popoloj aŭtonomion en la internaj aferoj. Tiamaniere nun ĉiu nacio povas libere evoluigi sian kulturon, uzi sian lingvon, havi sian literaturon, lernejojn k. t. p. Kaj tamen ĉiu memstara popolo, unuiginta kun najbaraj amikaj popoloj en unu *Russian Socialistan Federativan Sovjetan Respublikon*, havas plej bonan defendon de sia nacieco kaj uzas ĉiujn privilegiojn kaj servojn de granda lando.

En 1921 R.S.F.S.R. enhavis (parenteze mi nomas la ĉefurbon de la regiono):

1. *Ukrainan Soc. Sov. Respublikon* (Kiev);
2. *Azerbejĝanan S.S.R.* (Baku);
3. *Armenan S.S.R.* (Erivanj);
4. *Baŝkiran Aŭtonomian S.S.R.* (Sterlitamak);
5. *Montanan S.S.R.* (Vladikavkaz);
6. *Kartvelan S.S.R.* (Tiflis);
7. *Dagestanan S.S.R.* (Temir-Ĥan-Ŝura);
8. *Orient-Siberian Respublikon* (Vladivostok);
9. *Kirgizan Aŭt. S.S.R.* (Orenburg)
10. *Tataran Aŭt. S.S.R.* (Kazanj);
11. *Turkestanan S.S.R.* (Taŝkent);
12. *Aŭtonomian Kalmukan Regionon*;
13. *Karelan Laborkomunumon*;
14. *Aŭt. Marian (Mordvan) Regionon* (Krasnokokŝajsk);
15. *Aŭt. Regionon de apudvolgaj germanoj* (Marksstadt);
16. *Aŭt. Ĉuvaŝan Regionon* (Ĉeboksarg).

La senfinaj bataloj, lukto k. t. p. de malgrandaj popoloj kontraŭ la regantoj en nuna burĝa mondo finiĝos nur tiam, kiam la tuta Tero havos similan strukturon de unika ŝtato kun aŭtonomiaj regionoj. Sed tio povas efektiviĝi nur post forigo de la burĝa socio. Tiam la mondo rekonstruiĝos en pacan familion de egalrajtaj popoloj. Sed ni esperu, ke en malproksima estonteco estos nur sola nacio kaj sola kulturo — tiu de *Tuthomaro*.

Hermann Kononov

### (I) Dekreto de Konsilantaro de la popolaj Komisaroj pri libereco de konscienco, kaj pri ekleziaj, religiaj societoj.

1. La Eklezio disiĝas de la regno.
2. En la limoj de la Respubliko estas malpermesata eldonado de iaj lokaj leĝoj kaj decidoj, kiuj ĝenus aŭ limigus liberecon de konscienco, aŭ difinus iajn ajn preferojn aŭ privilegiojn sur fundamento de kredkonfesa aparteneco de la regnantoj.
3. Ĉiu regnanto povas konfesi deziratan de li religion, aŭ tute ne konfesi. Ĉiaj rajtlimigoj kunligitaj kun kredkonfeso de ia ajn religio, aŭ tuta nekonsfeso, foriĝas.  
*Rimarko: — El ĉiuj oficialaj aktoj ĉia montro de religia aparteneco kaj neaparteneco foriĝas.*
4. Agoj de la regnaj aŭ aliaj publikaj, sociaj institucioj ne estas akompanataj per iaj religiaj ritoj aŭ ceremonioj.
5. Libera plenumado de religiaj ritoj estas permesata tiom, kiom ili ne rompas socian bonordon, kaj ne estas akompanata je atenco kontraŭ rajtoj de civitanoj de la Sovjeta respubliko.  
*Loka estraro havas rajton zorgi pri necesaj rimedoj por konservo de socia bonordo kaj sendanĝero.*
6. Neniu povas, sin bazante sur siaj religiaj opinioj, rifuzi plenumi siajn regnanajn devojn.  
*Esceptoj el tiu ĉi regulo estas permesataj en ĉiu aparta okazo, laŭ decido de la popola juĝo, kondiĉe, ke unu regnanta devo estos anstataŭigita je la alia.*

7. Religia ĵuro foriĝas.

*En necesaj okazoj oni donas solenan promeson.*

8. Aktojn de socia stato registras regna estraro per fakoj de registro de edziĝoj kaj naskiĝoj.

9. Lernejo (*popolklereca afero*) disiĝas de la Eklezio.

*Kredinstruon en ĉiuj regnaj, sociaj, kaj ankaŭ privataj lernejoj, kie estas instruataj ĝeneralklerigaj objektoj, oni malpermesas. La regnantoj povas instrui kaj lerni religion privatmaniere.*

10. Ĉiuj ekleziaj kaj religiaj societoj submetiĝas al la ĝeneralaj reguloj pri privataj societoj kaj ligoj; kaj ili

(1) La granda socia skuo, kiu oriente forŝancelis la caran reĝimon kaj minacas ĉiujn kapitalistajn landojn, havas certe re-efikojn okcidenten. En sango kaj dolorego naskiĝas tie nova sociordo. Ni devas do tre atente studi ĉion rilatan al la Rusa Revolucio. Tiucele ni represas el la interesa "Eklezia Revuo", kun permeso de ĝia Redaktoro, S<sup>o</sup> A. J. Ashley, la dekreton pri libereco de konscienco en Rusio. — Red.

havas neniam privilegiojn kaj subvenciojn, nek de la regno, nek de ĝiaj lokaj aŭtonomiaj organizaĵoj.

11. Devigaj enkasigoj de kotizoj, kaj impostoj por bezonoj ekleziaj kaj religiaj societoj, kaj, egalmaniere, devigrimedoj, aŭ puno de flanko de tiuj ĉi societoj kontraŭ iliaj anoj, ne estas permesataj.

12. Neniaj eklezioj aŭ religiaj societoj rajtas posedi havaĵojn.

*Ili ne havas rajton juran.*

13. Ĉiuj havaĵoj de ekzistantaj ekleziaj kaj religiaj societoj en Rusujo estas deklarataj popola havaĵo. La konstruaĵoj kaj objektoj, destinitaj speciale por diservaj celoj estas fordonataj, laŭ apartaj decidoj de loka aŭ centra regna estraro, por senpaga uzado al konformaj religiaj societoj (*asocioj*).

### Kial Esperanto en Rusio malvenkas

Neniam kaj nenie Esp-o havis tiajn bonajn ŝancojn por venki, kiel dum la rusa revolucio. Neniam antaŭe larĝaj populaj amasoj tiel interesiĝis Esp-on, kaj registaro estis tiom favora al ni. Kaj nun vidante, ke Esp-a movado en Rusio malvigliĝas, ke Sovjeta registaro ne plu subtenas niajn organizaĵojn, ni povas diri, ke en ĉio ĉi estas kulpaj nur rusaj esperantistoj mem. Mi ne intencas tie ĉi rakonti la amasegon da malsaĝaĵoj, kiujn faris niaj "samideanoj" dum la jaroj de la revolucio. Mi por ekzemplo citos nur unu aventuron, kiu eble plej multe malutilis al Esp-o. Mi parolas pri konata "Eski". Kelkaj esperantistoj komunistoj en Samara ekintencis preni sur sin la taskon pri disvastigo de Esp-o inter komunistoj. Tial ili en 1919 ne longe meditante fondis "Esp-an Sekcion ĉe Illa Komunista Internaciano", eĉ ne demandinte pri konsento tian gravan institucion, kiel estas Internaciano. Efektive tian stultajon povis fari nur homoj kun infana naiveco. Tuj ili ellaboris instrukciojn, deklaracion, statuton k.t.p. La statuto estis ne malpli stranga. Laŭ ĝi ankaŭ senpartiaj esperantistoj povis esti Eskianoj, kaj tiamaniere nekomunistoj eniĝis komunistan Internacianon. En 1920 la ĉefoj de "Eski translokiĝis Moskvon kaj venis kun sia "Sekcio" al la Internaciano. Tie, kun mirigitaj okuloj, oni ĝentile al ili respondis, ke ĉe la Internaciano povas ekzisti nur naciaj sekcioj. Sekve la ĉefoj estis igitaj doni al Eski novan nomon: "Esperantista komunista internacio". La "Internacio" kun kelkdekoj da anoj nur en Rusio vegetaĉis ĝis *Centra Komitato de Rusa Komunista Partio* ne fermis ĝin. La tondrefrapita Eskia Centra Komitato kunvenadis dum tuta jaro pridiskutante kiel anonci tiun malĝojigan fakton al la esperantistaro, kaj ne decidis ĝis nun. Kredeble oni anoncos pri la fermo ne pli frue ol en 2022 j. Sama historio okazis kun rifuzo de "Komintern" adopti Esperantan Sekcion. Tio estis deklarita nur post duonjaro.

Ĝenerale ŝajnas, ke rusaj esperantistoj havas malsanon, kiun oni nomas "manio de majesteco". Ĉie, kie kolektiĝis du, tri laborantoj por Esp-o oni tuj komencas kunvoki diversajn "Kongresojn" kun 2½ da partoprenantoj, fondi "Regionajn" aŭ "Centrajn" Komitatojn, mortnaskitajn gazetaĉojn k.t.p. Finfine oni komencas kredi, ke tiujn "esperantistojn" altiras al Esp-o ne la lingvo, aŭ la ideo, sed gloram. Oficialigo de Esp-aj kluboj ofte donis ne paŝon al evoluiĝo de la organizaĵo, sed male: burokratigis

ĝin. En la ŝtata plano mankis iaj porlingvaj institucioj; Esp-ajn klubojn oni subtenis kiel ĉiujn aliajn rusajn klerigajn klubojn kaj postulis saman laboron, trudante tute fremdajn taskojn. Pli bona estis laboro en la Centro, ĉar nur tie centralismaj inklinoj havis ĝustan lokon. Sed ankaŭ tie la laboro estis hazarda kaj iafaĵe eraroz. Nova ekonomia politiko montris la nevivkapablecon de multaj esperantaj organizaĵoj. Kelkloke ili tute mortis, aliaj por havigi monon forĵetis poridean laboron kaj ekokupiĝis per aranĝo de dancvesperoj. Nia Centro montriĝis tute ne praktikema. Ekzemple ĝi detale prilaboras konsiston de luksa almanako por helpo al la malsatantoj, sed neniel povas trovi la monrimedojn por ĝin presi.

Ne estas mirinde, ke la registaro vidante malprudentajn agojn de la adeptoj de Esp-o, komencas opinii la lastan bagatelo ne valoranta atenton. Kaj dum esperantistoj daŭras naĝi en nebulo, idistoj rekomencas sian propagandon. Ne akcelante iajn neatingeblajn altaĵojn ili faras tion, kion ili povas. Maldolĉaj fruktoj de tia situacio jam aperis: Lingva studkomisiono ĉe "Komintern" aprobis idon. Se rusaj esperantistoj ankoraŭ nun ne konscios la gravecon de la momento, ne kolektos ĉiujn siajn fortojn, la Esp-a movado en Rusio por longe ekdormas.

H. K.

### Letero el Estonio

Regas ĉi tie ega teruro.

Eble jam vi eksciis per la socialistaj gazetoj pri la fimortigo de nia kara kamarado kaj gvidinto *Viktor Kingissepp*. La 3a majo, li estis kaptata kaj en la sama punkto kontraŭleĝe tuj mortpafata, laŭ decido de milita juĝantaro.

En Estonio estas paco jam de du jaroj, sed malgraŭ tio ekzistas ankoraŭ por laboristoj milita juĝantaro.

Granda estas la funebro de la estona proletario. Kingissepp sindoneme agadis por ni kiel komunisto, kvankam neleĝa estas ĉi tie komunisto partio.

Li naskiĝis en *Viktor Kingissepp* Arensburg en la jaro 1888. Tre inteligenta, eĉ talenta li estis. Fine de siaj studoj li ricevis en gimnazio oran medalon. Ellirinte gimnazion li iris en la Petrogradan juristan Fakultaton. Li jam aliĝis al la bolŝevika organizaĵo, kiu tiutempe estis neleĝa en Rusio. En



*Viktor Kingissepp*

Moskvo li studis la germanan lingvon kaj revenis Petrogradon, kie li nur laboris por politika afero.

Antaŭ lia morto li estis turmentigata de la fimortigistoj. La Sovjeta Registaro eksciinte pri lia aresto proponis interŝanĝon kontraŭ "blankulo", sed oni rapidis mortigi Kingisseppon. Poste la Rusoj petis la kadavron, sed ili trafis rifuzon.

La teruro tiea estas pli granda ol en Hungario, kie regas Horthy. Ĉiuj malliberejoj estas plenaj, kaj ĉiutage oni arestas novajn kamaradojn. La 19a majo okazos juĝo pri 115 komunistoj, inter kiuj troviĝas niaj ruĝaj esperantistoj.

Pro tio, malgraŭ granda fervoro por esp.o nia movado ne estas tre vigla.

T. 10a majo 1922 — *Satano*

## Stranga Informo

En komunistaj gazetoj aperis lastatempe informo pri decido de la *Studa Komisiono por alprenado de helpa lingvo en la III<sup>a</sup> Internaciano*, pri kies starigo ni sciigis nian leganton en la Oktobra n<sup>o</sup> de "S. R.". Jen eltirajo:

"... La Studa Komisiono konfesas, ke ĝenerala alprenado de helpa lingvo grave faciligus la taskojn de la komunismo, sed ĝi bedaŭras konstati, ke nun ne estas favora momento por ĝia enkonduko en la III<sup>a</sup> Internaciano.

"La esenca tasko de la komunistaj esp-istoj kaj idistoj estas kunigi siajn penojn kaj unuiĝi en komuna organizaĵo, kiu, fariĝinte potenca per la interkonsento kaj kunlaborado de la esp-istoj kaj idistoj, tiel povos malaperigi la antaŭjuĝojn, kiuj ankoraŭ kontraŭstaras la oficialan enkondukon de lingvo internacia. Tiu prepara propagando estas necesa, kaj ĝi povas esti farata sen neceseco por ĝiaj adeptoj, ke ili forlasu la uzadon de unu el la du lingvoj,"

Estas nenio riproĉinda en tiu konsilo, sed alie ni legas:

"... la Studa Komisiono rekomendas bazi la propagandon sur la studo kaj instruado de la lingvo ido, kiun oni devas konsideri kiel pli science supera, pli facile perfektebla, eĉ en ĝiaj malbonaĵoj, kaj sekve kiu havas pli da ŝanco esti fine oficiale alprenata..."

Ĝis plua ekzameno ni konsideras, ke la S. K. transpasis sian oficrajton kaj tute ne plenumis la komisionon por kiu ĝi estis starigita. Ĉe la III<sup>a</sup> Kongreso en Moskvo estis jene decidite:

"La Studa Komisiono por alprenado de helpa lingvo internacia estas komisiata por ekzameni(1) la problemon de sciencaj ekspertizistoj kaj prezenti al la proksima Kongreso kaj al la Ekzekucia Komitato de la "Komintern"-raporton kaj konkludojn..."

Nu, ni scias nenion pri la scienca ekspertizo. Ĉu fakte ĝi okazis? Ni tre dubas. Kaj atendante ricevi aŭtentikajn dokumentojn ni motivigas nian suspekton per la jenaj faktoj:

1) La konsisto de la Studa Komisiono malebligas senpartiecon: La sekretario, Itschner, kaj la prezidanto, Pogany, ambaŭ estas idistoj, dum neniu esp-isto troviĝis en la Komisiono;

1) Ne ekzameni mem.

2) Tiu partia Komisiono ne funkciis normale: Per letero sendita el Moskvo kaj datumita je 20 junio 1921. Itschner sciigis, ke la Studa Komisiono elektis min kiel "reprezentanton" por la eksterlandaj esp-istoj; 150 sv. frankoj estis al mi senditaj por ke mi aĉetu kaj havigu al la Komisiono bezonatajn dokumentojn.

Nu, neniam mi ricevis tiun sumon, neniam mi sukcesis ricevi respondon al miaj leteroj; dume la idista organizaĵo "Emancipanta Stelo", en Paris, rilatis kun la Komisiono; al ĝi oni sendis la preparolatan informon, dum mi, la "reprezentanto", ricevis nenion kaj estis lasita en plena nescio pri la irado de la afero. Ĉu tio estas serioza? Ĉu oni mokas la esp-istojn?(2) Tiaokaze oni ne atendu, ke ili obeu fantazian "rekomendon".

Ĝis oni estos rebatinta miajn argumentojn, mi daŭrigos opinii, ke ni troviĝas antaŭ nure idista entrepreno, kiu profitas la indiferentecon kaj maldiligentecon de la rusaj esp-istoj por propagandi idon sub kvazaŭa aŭspicio de la III<sup>a</sup> Internaciano.

Kelkfoje la idistoj, iom prave, riproĉis al esp-istoj pri blufado kaj fanfaronado; ŝajnas ke, en la nuna okazo, ili montriĝas veraj majstroj en intriga blufado.

Ne tiamaniere oni refaros unuiĝon en la rondoj de la mondlingvanoj.

E. L.

## PRIPENSINDAĴOJ

Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evolupovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus tiu eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam estus pereinta kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus Volapüke.

L. L. Zamenhof (1911)

\*

Ĉu do la vivo ne estas stato de ekvilibro inter la konservativa kaj aliĝa fortoj, inter la fiksjaj kaj moviĝaj elementoj, inter la konstanteco kaj la ŝanĝeco? Pro tio ke esperanto estas verko vere vivanta, ĝi ne povas malsubmeti sin je la leĝoj regantaj ĉiujn vivantajn verkojn kaj estaĵojn. —

GROSJEAN MAUPIN

## S. A. T.<sup>a</sup> Monkolekto por la Rusaj malsatuloj

9<sup>a</sup> listo de monoferantoj

J. Habert 10 fr.; Dro Pierrot 10 fr.; Barrot (Buenos Aires) 5.50 fr.; 9 Kdoj de Lodz (Polio): A. Murland, I. Zyss, F. Hiller, A. Aaro, K. Ino S. Landsberg, Kdo H. Kryntol, I. Rozeu, D. Patt, ĉiu po 100 Mk. p.; Glicenstein 50 Mk. p.; J. Grenkamp (Jaslo) 100 Mk. p.; Kahan (Berlin) 70 Mk. g.; S. (Dresden) 10 Mk. g. Kun la 7<sup>a</sup> kaj 8<sup>a</sup> listoj = 252,20 fr. fr., 57 kr. ĉek., 167 Mk. g., 950 Mk. p.

La produkto de la 6 antaŭaj listoj estis uzata por pagi la unuan ekspedon de nutraĵoj al Rusio (legi la majan N.on.)

2) Cetere eĉ se la decido de tiu Komisiono estus serioza, ĝi ligus nur la komunistajn esp-istojn.



## DIVERSAĴOJ

### Ili ne interkompreniĝas.

Ege disigita estas en Francio la sindikatista movado. Ne estas nia intenco nun ties esplori la kialojn. Ni volas nur noti unu kaŭzon de malpaco, kiun senmalice koniĝas K<sup>do</sup> Guy Tourette en "La Lutte de Classes" (n<sup>o</sup> 2), organo de la *Sindikata Internaciano Ruĝa*.

Temas pri rezolucioj alprenitaj ĉe la I<sup>a</sup> Kongreso de tiu organizaĵo, kiujn subskribis la francaj delegitoj *Tommasi* kaj *Godonnéche*. Ĉi lastaj estis riproĉitaj de siaj delegitoj. Nu, hodiaŭ, en la ĉi-supre citita gazeto, K<sup>do</sup> Tourette, unu el la riproĉintoj, konfesas, ke li kaj liaj kamaradoj tute miskomprenis la sencon de la rezolucioj alprenitaj:

"Ni sciis nenion pri la laboroj de la Kongreso, diras Tourette, sed ni estis legintaj en "Moskvo" raporton pri parolado de *Loriot* ĉe la Plenumanta Komitato, la 16<sup>a</sup> junio ... Tiu dokumento estis nur analiza raporto kaj ne laŭteksta citaĵo, raporto **dufoje tradukita**, kaj, poste tion ni eksciis, *ne tute ĝusta* ...

K<sup>do</sup> Guy Tourette bedaŭras pri tiu miskompreniĝo, kiu okazigis malpacojn en la sindikatista organizaĵo franca, sed li ne aludas pri neceseco de komuna lingvo, kiu ebligis la senperan interkompreniĝon.

La esperantistoj zorge notu tiajn faktojn. Estus ankaŭ bone enketi por ekscii pri la sumoj elspozitaj por tradukoj, eldonaĵoj en diversaj lingvoj ktp. Kiam ni posedos taŭgan dokumentaron ni povos pli sukcese almiti la indiferentecon de niaj ĉefoj por internacia lingvo.

### Propono (1).

Esperanto ne estas *celo*, sed nur *ilo*, per kiu ni volas ebligi, aŭ plifaciligi, la interkompreniĝon de la ruĝaj laboristoj. Do, ĉu ni pensas, ke ni povas atingi ĝin nur esperantistigante multajn laboristojn plej eble? Aŭ ĉu ni povas uzi esp-on ankaŭ alimaniere por la sama celo? Ni pripensu, ke, ankoraŭ dum longa tempo, en ĉiu lando nur la plej malmultaj laboristoj povos efektive kapabliĝi je la flua Esp.-parolado: tial ni ankoraŭ estos ofte devigataj nin interkomprenigi ankaŭ per naciaj lingvoj.

Nu, mi pensas, ke esp-o povas esti ankaŭ bona ilo por rapide tralerni ion pri la nin okaze interesigantaj lingvoj.

Ĉar la esp.a gramatiko kaj vortaro entenas erojn el ĉiuj ĉefaj lingvoj, devas esti facile instrui ĉiujn fremdajn lingvojn per *esp.o*. Kion cetere jam faris, pri kelkaj, iuj esp.-aj ĵurnaloj (ekz. la gazeto "Esperanto"). Tiamaniere, ĉiu plej-malplej bona esperantisto povus rapide fariĝi iome poligloto! Laŭ la teknika vidpunkto, oni devas verki tiajn lernolibrojn kvazaŭ oni pensus, ke Esperantujo estas aparta nacio, kies nacilingvo estas esp.o; alivorte, oni devas verki ilin ne nur esperantlingve, sed vere *per esp.o kaj por* la Esperantistoj. Mi aldonu, ke ĉiun el tiuj peresperantaj lernolibroj pri la nacilingvoj oni povos vendi en ĉiuj landoj, kie estas esperantistoj, t. e. en la tuta mondo. La per-nacilingvaj lernolibroj, kontraŭe, oni povas vendi nur en unu nacio. Ekzemple: por instrui la francan lingvon al neesperantisto Germano, Italo, Japano, oni bezonas tri lernolibrojn (francan pergermanan, francan peritalan, francan perjapanan); por instrui ĝin

1) En tiu ĉi skribaĵo mi parolas pri *nacioj, fremdaĵoj*, k. t. p. nur pro plia klereco: sed mi estas tute sennacieca!

al ĉiuj fremdaj esperantistoj (germanaj, italaj, japanaj, hinaj, nigrujoj, k. t. p., k. t. p.) ni bezonas male nur unu lernolibron (amplasantan gramatikon, franc-esp.-an plenan vortaron, esperant-francan radikaron).

Sed ni, S. A. T.anoj, certe ne havas sufiĉan monon por eldoni ti-ĉiujn lernolibrojn, kaj krome ni bezonas nian tempon por aliaj celoj. Tial, estos eble ne malbone proponi la aferon al la *neŭtralaj* esp.-aj asocioj, kiujn ĝi ankaŭ interesos laŭ la nur teknika vidpunkto; kaj poste uzi lian verkadon por niaj celoj, tiel kiel ni nepre faras ĉiutage je multaj aliaj aferoj!

Dokt. Domenico Carbone.

### "Akademia Fakoj pri Konkursoj kaj Premioj"

"Dum la vintro 1921—22 la Akademio ne sin okupis pri premiado, ĉar ĝi ricevis nur unu verkon por ekzameno kaj eventuala rekompenco. La kaŭzo estas sendube, ke nek aŭtoroj, nek eldonistoj sufiĉe informiĝis pri la Regularo. Utile estas do ĝin denove publikigi kaj konigi al la esperantista publiko.

Por eviti senutilan elspezon al aŭtoroj kaj eldonistoj, — la rekompenco estas nur honora, — la sendado de la libroj estu farata jena maniere: Kun la prezento oni sendu:

- 1 ekzempleron al la Prezidanto de la Akademio: Prof. Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris.
- 1 ekzempleron al la Direktoro por Konkursoj kaj Premioj: D<sup>ro</sup> L. Privat, 2 Chemin de Roches, Genève.

### Regularo pri verkoj rekompendataj de la Akademio.

1. La Akademio rekompendas ĉiujare kelkajn verkojn rimarkindajn laŭ stila rilato.
2. La nombro de la kronitaj verkoj ne superos kvin (5).
3. Oni rajtas proponi por la rekompenco tradukojn, sed originalaĵoj estos preferataj de la Akademio.
4. La prezentataj verkoj devas esti publikigitaj en la lasta jardeko.
5. Nur libroj, kiaj ajn estas ilia amplekso, aparte eldonitaj, sekve ne gazetaj artikoloj, nek manuskriptoj, estas prezentebaj.
6. Verkoj de Akademianoj ne estas rekompendeblaj.
7. La rajto de prezentado estas rezervita al la membroj de la L. Ko, kiuj rajtas proponi ĉiu po du verkoj, kun konsento de la aŭtoroj.
8. La proponoj, montrante tre klare kaj precize la titolon de la verko, la eldonejon kaj la daton de la unua apero, devas esti sendataj al la C. Oficejo (51 rue de Clichy, Paris) *antaŭ* la 1. de Marto ...
9. Akademia komisiono elektos, post la legado de ĉiuj proponitaj verkoj, la dek plej bonajn.
10. La plena Akad., post raporto de la komisiono, elektos la 5 rekompendotajn.

## Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Majo)

ANGLIO: Limouzin 9 fr.; — ARGENTINO: Barrot 5 fr.; — FRANCO: Th. Besnard 3 fr.; Coldefy 20 fr.; Migny 2 fr.; A. Robin 4,15 fr.; Boone 1 fr.; Gilbert 1 fr.; Morizet 1 fr.; — GERMANIO: Clemm 7 Mk.; Emmerich 20 Mk.; Schinkel 8 Mk.; S. Dresden 10 Mk.; — HOLLANDO: G. P. De Bruin 4,50 fr.; — POLIO: (Lodz) Kurland 100 Mk.; J. Zys 100 Mk.; F. Hiller 100 Mk.; A. Karo 100 Mk.; Rozen 100 Mk.; H. Krystal 100 Mk.; Landsberg 100 Mk.; D. Patt 100 Mk.; Glicenstein 50 Mk. Sume: 50,65 fr.; 45 Mk. Germ.; 850 Mk. Pol.;

# Internacia virina Ligo Kontraŭmilita

## DEKLARACIO

— — Estas decidite:

1) Neniam konsenti pri militema ideo. 2) Neniam kaj neniel partopreni militon. 3) En okazo de konfliktoj kun najbaraj nacioj, tuj interveni per ĉiuj rimedoj cele al paca solvo. 4) Ĉiam kontraŭstari koloniigan militon. 5) En okazo de konfliktoj, alvoki la man- kaj spiritalaboristojn, kaj ĉiujn virinajn organizaĵojn. 6) Se, malgraŭ tiu agado, la milito estus decidita de la registaroj, malobei la mobilizadon kaj rifuzi ĉiun ajn primilitan oficon, ĉar estas konsiderinde, ke la plej eta laboro helpas daŭrigi la militon. — — —

— — Plie, la aniĝantinoj de la Ligo admonas ĉiujn virinojn, ke ili atentu pri la edukado de siaj infanoj, malhelpante la tendencon instruadon de la Historio en lernejoj, rifuzante, ke iliaj infanoj partoprenu en militglorigaj kantoj kaj en ĉiu ajn primilita manifestado.

Ĉiuj aliĝantinoj de la Ligo firme promesas, ke neniam ili donacos militajn ludilojn kaj librojn al siaj infanoj, ke neniam ili kondukos ilin al ĉeestado de militaj spektakloj kaj ceremonioj... Kiu ajn estu la momento kaj la cirkonstancoj ĉiam ili agados kontraŭ la milito kaj cele al la Internacia Unuiĝo de la Popoloj.



Tiu bildo estas reprodukto de afiŝo, kiu estis lastatempe gluita sur muroj en Paris, okaze de propaganda kunveno de la *Virina Ligo Kontraŭmilita*. — Niaj legantoj danku al la verkinto, K<sup>do</sup> Pierre Larivière, kiu afable rajtigis nin ilustrati nian Revuon per tiu elokventa desegnaĵo. — Por konigi la celojn de tiu Ligo ni represas supre la tradukon de kelkaj alineoj el ĝia Statuto. — Interesiĝantoj povas ricevi informojn en esperanto, skribante al S<sup>ino</sup> P. Larivière, 14 rue des Lions Paris (IV).

## Problemo

De DAN ANDERSSON<sup>(1)</sup>.

Tre malproksime en la oceano, pli malproksime ol kie subiras la suno kaj flugas la cikonioj de l' sonĝoj, iam troviĝis insulo sur kiu loĝis libera kaj gaja popolo zorganta nur por la estanta tago, sed neniam por la venonta. Sed ili kredis je severaj kaj kruelaj dioj kaj konstruis por ili altarojn el ŝtono. Iufoje okazis mizeraj tempoj kaj la herbo sur la tero nigriĝis kaj la birdoj de la arboj falis mortaj teren. Tiam oni abunde oferis sed kiam revenis la

bonaj tagoj forgesiĝis tiel la oferado kiel la adorado. Anstataŭ tio oni dancis ĉirkaŭ flamanantaj ĝojfajroj kantante gajajn kantetojn, ĉar ĝi estis gaja popolo.

Foje, kiam la senpluveco furiozis kaj la malsovaĝaj cervoj centnombre mortis kaj la aveloj falis de la velkintaj arbustoj, venis al la insulo fremdulo en nigra, minaca formo. La junuloj de la gento neniam antaŭ vidis lin, sed la maljunaj pastroj lin rekonis.

*Malsato.* Post kiam la pastroj vidis lin, ili tuj kunvokis la tutan popolon ordonante al ĝi



Dan Andersson

konstrui la altarojn ankoraŭ pli altaj, sed troviĝis jam neniu, kiu havis forton alporti ŝtonojn kaj brulotaĵon, ĉar jam efikis la brilo de la okuloj de Malsato, kio faris iliajn brakojn malfortaj, dorsojn kurbaj kaj vangojn kavaj.

Ĝuste en tiu tempo vagis sur la insulo maljuna kaj klera viro kolektante ŝtonojn, kreskaĵojn kun radikoj, kiujn li metas en sian korbon. Li scipovis analizi, disekcii kaj klasifiki ĉion. Li estis tiom klera, ke li preskaŭ forgesis sian propran nomon kaj parencaron krom tio li povis aserti, ke li vidis kaj esploris ĉion ajn. Sed li kredis ke li neniam vidis Malsato'n.

1) Dan Andersson, sveda verkisto, naskiĝis la 6<sup>a</sup> aprilo 1888 en la vilaĝo Luosso, lokita en vasta arbarregiono. Lia patro estis popollerneja instruisto kaj la hejmo estis tiel malriĉa, ke Dan jam estante infano devis eklabori kiel arbhakisto. Dum sia mallonga vivo li tamen havis okazon praktiki plej diversajn profesiojn. Lia unua libro "Historioj de lignokarbigistoj" aperis en la jaro 1914. Pli malfrue aperis la jenaj libroj: *La kantetoj de la lignokarbigisto* (1915), *Nomiĝas superstiĝo* (1916), *Nigraj baladoj* (1917), *Tri senhejmuloj* (1918), *La heredaĵo de Davice Ramm* (1919). Krome li ankaŭ tradukis kolekton el la verkoj de Kipling, kiujn li publikigis en la jaro 1918, sub la titolo *Sur sep maroj*. Lia lasta verko estas rakontaro el lia estado en Nord-Ameriko sub la titolo *Chi-Mo-Ka-Ma*.

Sed tro frue forrabis lin la senkompata morto. Okaze loĝante en hotelo en *Stockholm* li dumnokte mortis pro cianhidrogena venenigo kaŭze de ĵus malzorge farita desinfektado de la ĉambro. Per lia malapero la sveda proletario perdis unu el siaj plej ŝatataj verkistoj, ĉar neniu el la novaj estas tiom estimata de la sveda laboristaro. Ĉiuj liaj verkoj estas saturitaj per vera idealismo kaj kondamno kontraŭ maljusteco kaj mizero en la homa socio.

Dum la profesoro vagis serĉante kreskaĵojn kaj konkajn ekaperis subite Malsato. Ĉar li neniam antaŭe vidis ĝin, li opiniis ke estas homo. Jam de jaroj studinte la lingvon de la insulo ekdeziris li paroli kun la viro.

— Ĉu vi havas vian hejmon sur la insulo, demandis la profesoro.

— Nur provizore. Alitempe mi loĝas en via urbo. Ĉu vi tie neniam vidis min?

— Ne, vin mi ne povas rekonii. Sed kial vi parolas la ĉi-tian lingvon ne estante insulano.

— Mi tre facile komprenigas min ĉe ĉiu popolo. Mi vidas ke vi kolektas ŝtonojn, do vi certe estas klera viro, divenu al kiu gento mi apartenas, aŭ pli bone, kiu mi estas.

— Atendu, mi devas vin unue rigardi! Ĉu vi permesas al mi palpi viajn brakojn kaj muskolojn?

— Kion? Vi ja ne havas konsistecon, do vi estas nur halucinacio!

— Kontraŭe! Neniu povas esti pli reala ol mi kaj tion vi spertos se vi restos longe tie ĉi. Sed rigardu min plej atente!

La maljuna klerulo sidiĝis sur ŝtonon kaj Malsato sur alian. Ambaŭ kun granda atento rigardis sin reciproke. Jen estiĝis stranga nebulo inter ili, ke la profesoro ne sufiĉe klare povis rigardi la alian. Ŝajnis al la profesoro ke la alia ne plu similis sin kaj subite tutmalaperis la bildo. Kion li nun vidas, estas granda, malbela kaj malgrasa besto, kies ripoj estas videblaj sub la bruna haŭto. La besto estis ligita al veturilo de buĉisto kaj al la profesoro ekŝajnis ke li jam iam vidis tion ĉi.

— Ĉu vi scias kiu mi estas? demandis Malsato.

— Mi ne scias, eble vi estas maljuna kaleŝoĉevalo el mia hejmurbo. Eble mi iam vidis vin? Jes estas vi, maljuna kaj malsata ĉevalo. Vi certe estas sendenta kaj pro tio ne povas manĝi.

— Ĉu mi ne estas ankoraŭ io plia? Atentu pli bone!

La profesoro rigardegis la demandinton, sed li vidis nur malgrandan kaj palan knabinon el sensuna strateto. Ŝi sidis sur ŝtuparo kaj ŝiaj vangoj estis tre kavaj. La hararo estis hela kaj bela. Ŝi paroletis por si mem, etendis la manetojn en la malplena aero, ekstremis kaj falis kontraŭ la tero. Venis policisto por forporti ŝin. . . .

— Vi, diris la profesoro, estas malgranda knabino el korto en City. La policisto vin forportis.

— Mi estas ankoraŭ io plia, respondis Malsato.

Sed, ĉu vi vidas la nubon tie malproksime. Post duon-horo ni ricevos pluvon sur la insulon kaj tial mi devas forkuri, ĉar la pluvo kaj mi ne povas toleri unu la alian sur la insulo.

— Kaj kien vi iros?

— Al City, via urbo. Tie mi havas multon por fari.

— Sed, se ankaŭ tie pluvos? Tiam vi devas forlasi ĝin.

— Tute ne! Se pluvas tie ĉi, tio signifas panon por ĉiuj, sed kvankam pluvas en City, tio signifas panon nur por kelkaj.

— Kial? Kio estas la kaŭzo?


— Tion vi elpensu, vi, kiu estas profesoro, diris Malsato.

Kaj poste ĝi malaperis.

El la sveda tradukis Viktor Bonde.

*La scio estas senlima, kaj homo, plej instruita laŭ la opinio de aliaj, estas same malproksima de la vera scio, kiel simpla vilaĝano.*

RUSKIN



Por la Nacio! . . .

## La Angulo de l' Poetoj

KANTO DE SENNACIULO  
de LEOPOLD KRONENBERG

Ho, jam delonge mi pripensis kaŭzon,  
Ke nun homo por alia lupo:  
Mi trovis ĉiam ŝoviniŝtan nauzon,  
Por ĝi malamo plej bona okupo, —  
Do pensar' mia fariĝis gracia,  
Ĉar sennacia!

Kaj dum milito vidinte mortigojn,  
Bestajn kruelojn kaj sangajn atakojn,  
Novajn por homoj mi deziris ligojn,  
Al nova vivo mi etendis brakojn,  
Ĝis fine vojo montriĝis racia,  
Ĉar sennacia!

Mi scias bone, ke en disvolviĝo  
De la animo, de l'tuta homaro,  
Alvenos fine komuna fratiĝo:  
Staros nacioj ĉe unu altaro,  
Kaj tia faro estos laststacia,  
Ĉar sennacia!

Ni iru, fratoj, en la vastan mondon  
Al la fremduloj kaj al la najbaroj,  
Kreu homaran unu grandan rondon,  
Diru pri belaj estontecaj jaroj,  
Ĝiam homaro estos celkonscia,  
Ĉar sennacia!

Bydgoszcz (Bromberg), 25-an de marto, 1922

### LA KOMUNISTA HEJMO!

(Laŭ ĉeĥa melodio: "Kde Domov moj" aŭ laŭ la sudslava melodio "Gdje je stanak moj?" Vortoj de NOVULO.)

Ĉu estas hejm'? La mia hejm'?  
Kie homoj ame vivas,  
Sian dorson ne kurbigas  
Antaŭ iu riĉegul' —  
Ĉiu homo egalul'?  
Tie estus mia hejmo —  
Paradizo, mia land!

Ĉu estas hejm'? La mia hejm'?  
Kie homon senpovigas,  
Homo homon ne sklavigas,  
Kaj armilojn ĵetis for, —  
Sin okupas per Labor'?  
Tie estus mia hejmo, —  
Paradizo, mia land!

Ĉu estas hejm'? La mia hejm'?  
Kie homoj ŝatas Pacon,  
Por la art' ne havas lacon,  
Libro, danc', muzik' kaj kant'  
Ilin estas amuzant'?  
Tie estus mia hejmo, —  
Paradizo, mia land'!

Ĉu estas hejm'? La mia hejm'?  
Kie homoj sin komprenas,  
Celojn idealajn tenas,  
Kie regas feliĉec' —  
Komunum' de l'liberec'?  
Tie estus mia hejmo,  
Paradizo, mia land!

MAŜINA PARADIZO (1)  
de MAŜIROV-SAMOBYTNIK

En aero, sub la suno ĉirkaŭita per la floroj  
Vi al mi ĉarmige frustras pri vilaĝa, sonĝa land'  
Sed al mi responde kantas kun fiero bru' kaj fajfo,  
Mia kara, mia fera, la maŝina paradiz'.

Nur en mia fabrikejo estas lok' de miaj revoj,  
En mi tuto estas viva; se levilon tuŝos mi,  
Tuj sub mia mano bruos ŝtalo kanton de malsato  
Kanton de kreado tera, el la nigra sia brust'.

Ĉu por mi valoras ion la antikvaj malveraĵoj,  
En senlima atingeco kreas mi realan kant',  
Mi ekvolos — kaj al suno flugos brilaj ŝtalaj birdoj,  
Mi ekvolos — kaj feraĵo brilos kvazaŭ diamant'.

Mi ekvolos — kaj en maro sonos laŭte lango fera  
Mi en lando nekonata streĉos telegrafajn kord',  
Sur relaro, trans abismo trafluginte en aero  
Mi varmigos vin per suno aŭ deĵetos vin al nord'.

Ja per mia homa forto fluas akvo en fontano  
Kaj briladas ĉielruĝoj dum vespero kaj maten',  
Kaj de maroj grizajn akvojn trapasigas ŝip-gigantoj,  
Tera brusto disŝirita estas ĝis la centro mem.

Ĉu ne mia brilas frunto de mirinda nia horo,  
Kaj sur ĝi tri sunoj lumas — la tri leĝoj de estec'.  
Fort' antikva de Naturo, de obstina hom' laboro  
Kaj brilanta lia saĝo, hela saĝo de diec'.

Do triumfu, ĝoje bruu, la Natur' renovigita  
Gloru vi Mesion fero, kavaliron de nuntemp',  
En ĉi tiuj manoj estas liberec' nelimigita,  
Kaj en la muskoloj ferajestas de homar' printemp'.  
6-IV-1922 El rusigis V. KATALINOV

(1) Al kritikistoj. — Celante fari tradukon tre similan al originalo, mi estis devigita ne ĉie uzi rimojn kaj aliajn regulojn de l' poezio.

La versaĵo apartenas al proletaria poezio, kiu neas ĉiujn regulojn en verkado, kaj starigas al si taskon, transdoni al legantoj siajn pensojn kaj sentojn. Pro tia celo la traduko estas la plej ĝusta, kiel nur estas eble traduki en Esperanto. V.K.



## PEDAGOGIA FAKO

### Labora lernejo

En tiu ĉi artikoleto mi volas starigi kelkajn nedubeblajn principojn de demokratia lernejo de proletario (t.e. de Internacio).

#### 1. SENNACIISMO de LERNEJO kaj de EDUKADO

La unua signifas ke ĉiu homo, ĉu fremdulo ĉu samregnano, povas lerni en ia ajn lernejo sendepende de nacieco, religio, raso, subregateco, socia klaso, sekso kaj aliaj apartaĵoj.

La dua signifas ke la spirito de lernejo devas esti ĝenerala, komunhomara aŭ komunhoma, ne naciisma (tio eĉ nature devenas de l'unua principo de sennaciismo de lernejo), ĉar se lernas diversnaciaj diversregnaj infanoj en la lernejo, ĉu estas eble, permeseble inspiri en ilin spiriton de nacio al kiu apartenas la lernejo? Ja tio estas kontraŭnatura!

Do, la spirito de lernejo devas esti homaranisma. Estu civitano de l'Mondo, filo de l'Homaro, regato de unu granda homa familia Rondego, ĉar homoj tiom intermiksiĝis, ke finfine malaperas ideo de nacieco kaj geografiloka unueco.

#### 2. SENPAGECO de Lernejo

La principo estas sendisputebla.

#### 3. PRAKTIKECO de Lernejo

Ni devas konfesi ke nuntempa ialanda lernejo ne pretigas plejofte (krom profesiaj lernejoj) infanojn fariĝi veraj civitanoj, kaj poveblaj elteni vivbataladon por ekzistado. Oni instruas en ĝeneralaj mezlernejoj al teorioj de multaj sciencdisciplinoj, parte utilaj por mensoj, sed oni ne instruas plejofte sufiĉe al multaj metioj, utilaj por ĉiutaga vivo, oni ne instruas al akomodigo al severaj kondiĉoj de vivo, oni ne penas elvoki iniciatpovon de infanoj. Kaj la finintaj mezlernejoj ofte estas senpovaj en vivbatalo, kaj ilia menso tute ne estas klera en socia rilato.

Ili povas kalkuli distancon ĝis luno, pezon de l'suno komprenas trigonometriajn funkciojn k.t.p.; sed ne estas kleraj pri socia strukturo, pri politika ekonomio, pri metioj, pri rilatoj de regnoj (industrio, komerco, politiko). En okazo de malfacilaj cirkonstancoj ili ne povas mem prepari por si necesajojn de ĉiutaga vivo, mem konstrui seĝon aŭ tableton, mem kuiru manĝaĵon, mem planti kaj rikolti aŭ ion kulturati, k.t.p. Pri virinoj, ili pretiĝas fariĝi patrinoj, edzinoj kaj oni ilin ne instruas al patrinaj kaj seksaj demandoj,

oni ne instruas ilin fariĝi civitaninoj kaj scii kelkajn metiojn el la plej necesaj en la vivo ordinara.

Morale — ellaborado de individualismo kunigata kun sento de solidareco kaj komuneco, grupa disciplino kaj kunhelpeco.

Se la homa vivo estas ega lernejo, la lernejo devas esti eta vivejo, t.e. reflekti realan vivon kaj alkitimigi infanojn al socia kunvivo, kaj la rilatoj inter lernantoj, studentoj kaj instruantoj devas esti bazitaj sur principo de solidareco inter plikompetentaj kaj nekompetentaj kunfratoj, sed ne kiel nun inter venkantoj kaj venkatoj aŭ lupoj kaj hundoj.

#### 4. LIBERECO de edukado; NATURMETODECO de instruado

Lernantoj ne devas lerni parkere kiel nune, sed ili devas per ekskursoj, lerniloj kaj propra iniciato serĉkompreni sub gvidado de spertaj edukistoj scion pri geografio, naturscienco, fiziko, eĉ geometrio.

Ekskursado, plantado, esplorado, kunfarado, lekiado, rakontado, muzikado, kantado, mezurado de teraj parceloj, bird-animal-hom-flegado, lerneja memhigieno kaj memkurado, konstruado praktika, studo de diversaj metioj, ekzemple en unuaj jaroj de lerneja vivo bona estas bindarto, skulptado kaj desegnado (tio taŭgas ankaŭ daŭrigota en sekvontaj jaroj) kaj diversaj facilaj manlaboroj, poste sekvas lignajarto, tornarto (tre facila eĉ por 11—13 jaraĝuloj, ĉizarto sekvu ilin sekvontjare, poste preparado de zoologiaĵoj, botanikaĵoj, antomologiaĵoj, reliefaj mapoj, simplaj fizikiloj, bird-figuraĵoj. Ĉiu lernejo havu propran presejon kaj gelernantoj eldonu, verku, presu, kompostu mem propran ĵurnalon, kaj en lastaj jaroj de lernado aldonu ilustrajfakon (litografio kaj fano de kliŝoj kaj fotografarto.)

Certe, ili mem lernu laŭorde laŭvice manĝaĵpreparadon, havu legomĝardenon kaj florigardenon (por ellaborado de bongusteco) laŭ japana maniero (ĉar japanoj tiurilate estas veraj majstroj).

Ekzercado en parolado kaj diskutado ellaboras elokventecon kaj alkitimiĝos al mitingoj kaj publikaj paroladoj.

Utilaj ludoj, ekzemple ŝakludo kaj aliaj ne malutilas.

Certe teoriaj lecionoj povos kaj devos esti, sed ne kiel ĉefaĵo, nur kiel aldonajo, rezulto de praktikaĵoj.

Lernejo devas alkitimigi infanojn al laboro, ĝi estas laborejo, sed laborado devas esti interesa por infanoj. Konkursado en laboro farata estas bona instigilo, kaj ĝi anstataŭigas nuntempajn ekzamenojn.

Nature ambaŭseksoj devas kunlerni.

Estus dezirinde aranĝi lernejojn ne en urboj, sed en eksterurboj por ke infanoj ĝuu freŝan aeron, havu sufiĉan lokon por plantado de legomoj, floroj, arboj kaj eĉ ioma terplugado kaj grensemado. Ni devas alproksimigi infanojn de laboristoj kaj inteligentaj laborantoj al terkulturuloj: nur tiamaniere malaperos malkompreno kaj abismo inter vilaĝanaro kaj laboristaro. Ĝi ja estas unu el la grandaj problemoj de nuntempaĵo.

Lecionoj de historio devas esti en formo de lekcionoj kun helpo de kinematografo kaj teatra ludaĵo, farata de infanoj mem; la historiaj faktoj devas esti traktataj de vidpunkto de suferanta popolo kaj ne laŭ caroj kaj reĝoj: historio de laborantoj.

Al kooperacio infanoj povas alkitimigi, aranĝante lernejan societon kooperan kaj eĉ diversan kooperadon vendan

Eldonkvanto de tiu ĉi n°  
**5000** ekzempleroj

aŭ prilaboran (ekz. espluatado de terparcelo per legomplanto, florplanto por vendado loterie aŭ alimaniere, ŝparkaso, k.t.p.)

Socia vivo en lernejo devas bati plenimpulse. Instruistoj devas esti nur instigantoj, konsilantoj, direktantoj. Kuraĝigo de entreprenemo de gelnantoj kaj de iniciato estas bazo de libera edukado, sed la agado de entreprenemuloj devas esti laŭdebla, ne egoisma sed kolektiva, komuna, kooperativa.

### 5. APARTAJ LERNEJOJ — INFANAJ KOLONIOJ

Lernado en komunumaj lernejoj devas esti deviga kaj neniu gepatro povas malpermesi al geinfanoj eniri lernejon. Mi supre parolis nur pri ĝenerala edukado. Certe, post fino de tia ĝenerala komuna lernejo (kelkara), lerninto, laŭ inklino, povas eniri ian profesion metian aŭ alian specialan lernejon por specialiĝo. Pri tipo de tiaj specialaj altlernejoj nun mi ne riparolas.

Al mi ŝajnas, ke estus bone se infanoj ne estus alvenantaj lernejon, sed estus tie loĝantoj, kaj — en celo de ne malfortiĝo de kunligo kun siaj familioj — ili povas periode ricevi liberpermeson reveni hejmen laŭvole. Certe por regno, estos nefacile nutri infanojn sed la celo atingota valoras tian elspezon, plue parton de sia nutraĵo infanoj prilaboras per propra laboro (legomĝardenoj, grenkampetoj, vendado de manlaboraĵoj, teatraĵoj, koncertoj, k.t.p.)

Tiamaniere, jam estante lernantoj, ili ne estos parasitoj. Tia lernejo estos kvazaŭ infana kolonio.

*Inocento Serišev*

## PRIEDUKAJ KONSIDEROJ.

En ĉiuj rondoj, kie oni pli malpli zorgas pri edukado de l' popola klaso, oni varmege indignas kontraŭ la sorto farita de la estranta burĝa klaso al infanoj proletarianoj. Tiuj infanoj, almenaŭ la plej multaj, fakte ne povas daŭrigi siajn studojn pro manko de mono de siaj gepatroj, kaj tamen el ili oni trovas plenkapablajn inteligentulojn. Cetere la ŝtatoj, de multaj jaroj, disdonas stipendiojn por kelkaj el ili, sed estas tute ne sufiĉa rimedo, kiu aliparte ne ĉiam iras al plej indaj meritantoj sed tro ofte al gefiloj de duonburĝa klaso: oficistoj, magistratoj, oficiroj k. t. p.

Do, la indigno estas vasta pri tiu maljusteco, kaj suferantoj ne havas respondecon pri la dirita stato. Mi tute komprenas tiun indignon kaj ĝin partoprenas kondiĉe, ke ĝi estu nur kaŭzita de la socia maljusteco, malegaleco aŭ ankoraŭ de tio, ke ĉiu individuo rajtas evoluigi kaj disvolviĝi sian estaĵon kiel eble plej vaste. Sed mi ne komprenas tiun indignon ĉu ties kaŭzo estas profitema kaj kvazaŭ burĝema.

Tion ĉi supran mi klarigas! Mi ne tute bedaŭras, ke infanoj ne povus pro faktoj rilatantaj al socistato nuna ricevi tiujn "altatestojn", kiuj donos al ili sekve la eblon havi "honorindan profesion", ĉar nun honorinda profesio en nia socisistemo, estas tro ofte profesio, kiu ne estas tute honorinda rilate la moralan vidpunkton. Kompreneble mi parolas pri proletaria moralo, kiu ne ĉiam similas la burĝan. Tiukaze ekzemple profesioj, kiaj altoficista, juĝista, policista k. a., estas konsiderataj komune, kiel honorindaj sed por proletario nur honorindaj estas la profesioj, kiuj donas aŭ helpas Vivon, ĉar nenia racia etiko povas akcepti, kiel bazon, alion ol Vivon.

Kontraŭe, tiu baro al disdonigo de la burĝa kulturo en proletarianon min kontentigas ĉar kvankam la principoj min allogas komence, mi devas prikonsideri la faktojn.

Nu! multaj spertoj vidigis al mi, ke ofte tiuj infanoj naskitaj en proletaria klaso, kiuj per stipendioj povas daŭrigi sian studadon trafas altan rangon en socio kaj tiamaniere utilas al daŭrado de tiu socia stato. Plue tiuj infanoj baldaŭ forgesas sian devenon. Vivante en burĝaj medioj ili alprenas burĝajn emojn. Baldaŭ difektitaj de envio ili plimultigas tiun duonburĝan klason, kiu pro malvirta ambicio estas la *plej firma helpapoganto de l' estranta klaso*.

Ili estis la plej belaj kreskaĵoj de l' proletaria inteligenteco kaj floras . . . por la burĝaro. Pli bedaŭrinde ankoraŭ mi vidas en tio kvazaŭ *transfluigon de forta kaj sana sango* de l' proletario al la burĝo, kies kapabloj ne plu taŭgas por la pli kaj pli postulantaj devoj de sia estrado.

Tion, kion mi spertis mi devas diskonigi kaj vi ankaŭ tion scias sed eble ne sufiĉe rimarkis. Ne estu kiel tiu patrino, kiu iam diris al mi: "Ho! mian knabeton lin mi imagas oficiro! Kiel mi dezirus ke li estos oficiro!" En ŝiaj okuloj pasis orumitaj vizioj, majesta kaj teruriga uniformo kaj pli teruriga sabro! Kaj ŝi estis nek malbona nek sangavida sed . . . ŝi ne sciis. Eble ŝiaj revoj estis plenplene kontentigitaj de la lasta mondbuĉado; mi ne tion deziras! . . . Ne estu kiel tiu blinda patrino, kiu ne pensis, ke oficiroj partoprenas la sangon mortigantan honton ĉar tia estas ilia medio.

Ne kredu pri justeco de juĝisto, boneco de policisto, honesteco de bankisto, veremeco de pastro, k. a. Ne kredu, ke via filo scios kontraŭstari la fluegon de l'torento de miloj kaj miloj da faktoj, gravaj aŭ ne, brute starantaj aŭ lerte enŝoviĝantaj, ĉiam insistaj kaj persistaj.

Ne donu vian filon al tiu socia "Molok!"

\* \* \*

La plej sagaca parolo, kiun vi povas eldiri, vi, proletariaj kamaradoj, estas tiu: "Mia filo estos proletario, laboristo kiel mi!"

Jen malkonsentaj klamoj: ". . . leĝo de l' Progreso! . . . direktu la kapabluloj! . . . k. a." Tutpretaj formuloj are ronkas je miaj oreloj.

Permesu, ke mi memoru aliajn parolojn. Oni aŭdas centfoje en mitingo, oni legas dudekfoje en gazetoj tiun vorton: "KLASBATALO!" Ĉu estas nur formulo aŭ kontraŭe tro vera realaĵo? Nu! ĉu klasbatalo ne estas ronka formulo, estu ni anoj de nia klaso! estu ni proletarioj! estu ni tiaj fervore! estu ni konsciaj proletarioj!

Estu tiaj intime! Tio signifas, ke en la plej verema parto de ni mem *ni juĝis inter subpremanto kaj subpremato*; sed tio ne signifas, ke ni estu tiaj pro envio kaj bedaŭro. Envia la burĝan klason estas ĝin aprobi, estas signi kun ĝi "intiman ĵurkonsenton", estas ideo forlasi sian klason!

Plue ni devas ĝuste taksii la kulturon universitatan kaj tio malincitos nin bedaŭri tion, ke gefiloj de proletario ne ofte povas ĝin ricevi. Mi ne havas kompetenton sufiĉan por ĝin taksii rilate la teknikan vidpunkton, sed mi povas diri kaj vi ĉiuj ankaŭ povas diri, manlaboristoj, ke tiu kulturo ne liberigas la ricevinton el gravaj eraroj, difektoj, malvirtoj. Ĝi eble kondukas al klereco sed *ne kapablas doni la intiman harmonion*, kiu pli ol vasta scio estas la vera bieno de l' homa animo. Ĝi ne kapablas starigi kontraŭ la maljusteco kaj malegaleco sociaj la kulpigadon de l' Moralo apogata de l' Scio.

Kaj tio gravas pli ol oni kredas nun, dum nia jarcento, materialista pro kompense al la pasintaj, idealistaj. Tio gravas ĉar la materialaj progresoj ne enkondukas aŭtomate la moralajn progresojn, sed nur ilin ebligas. Ili tute male ebligas ankaŭ la plifirmigon de sociaj eraroj. Ĉu ni ne vidis antaŭnelonge la mobilizadon de ĉiuj intelektaj penoj kaj produktoj por verko de sangavida malamo?

Same kiel socio pliciviliziĝas nur rilate la materialan fakon neplinoobligante kaj neplibeligante en vojo de libereco kaj justeco, tiel same individuo povas plikleriĝi neplivirtiĝante samtempe. Tiaj socio kaj individuo estas ambaŭ malharmoniaj, kelkfoje utilaj sed ofte pereigaj por homara progreso.

Do, ne plu senpripense kredis pri la liberiga potenco de alta kulturo, kiun iuj laŭdis, eble senpripense, eble intence!

Cetere memoru tiun noblan parolon de fama historisto filozofa franca (XIX<sup>a</sup> jarcento), kies popolemaj sentoj ĉiurilate aperas en lia verko:

“Ĉu ĉiuj estuloj, eĉ plej humilaj ne eniras la Civiton, tiaokaze mi ankaŭ restu ekstere!”

Por burĝa klaso ne temas disvastigi racian kulturon en profundajn popolamasojn sed nur utiligi — “por socia profito”, kiel ili diras — la plej talentavantojn el proletaria infanaro. Tio estas tute komprenebla laŭ la burĝa vidpunkto. Mi pensas, ke laŭ la proletaria, mi devas denunci tiun cinikan entreprenon kaj helpi niajn samklasanojn ne plu fali en tiun kaptilon.

Por ni, proletarioj, temas precipe pri plena edukado de la tuta proletario, laŭ mezuro de la individuaj kapabloj mem determinataj — antaŭ ĉio — ne en Lernejo, Universitato, aŭ artekreitaj medioj, kie nur ia idearo estas permesata, sed en Vivo mem: en naturo, en laborejoj. Ni deziras la fruktoplenan kunligon de scio kaj laboro sub la ideala influo de l' homara frateco.

Ĉar se mi ne akceptas la burĝan komploton kontraŭ la proletaria eminentularo, tio ne signifas, ke mi deziras la komunan malklerecon. Mi ne ambicias doni al la burĝaj ekspluatejoj ĝian sklavularon, same kiel mi ne deziras nek helpi la rekruton de la gardistaro de tiuj sklavejoj, nek doni al la burĝaro la plej bonajn soldatojn de la venonta proletaria armeo.

Estu ni fiere anoj de nia klaso! Estu fieraj proletarioj!

E. Stern.

### Instruado pri Moralo

“Voli instrui moralon” — difinante al tiu vorto “instrui” ĝian kutiman signifon — estas entrepreno plej kimerata. Pri tio ĉi temas ĝeneralan direktivon pli ol formuli moralregulojn. Lerta edukisto ekscitante en la spirito de sia lernanto kulton pri vero; utiligante ĉiujn ekzemplojn, ĉiujn observojn de la ĉiutaga spertado senpene sukcesos laŭgrade formi tiun infanan konsciencan por el ĝi fari konsciencan homan . . . .

Oni tiel aldirektos la infanon al altruismaj sentoj, kiuj kvazaŭ konsistigas la tutan moralon; oni lin alkondukos iom post iom al la vasta konceptado pri solidareco, pri necesa kunigeco de l' homoj en la senĉesa batalo, kiun ili estas riskontaj kontraŭ la naturo. La akordiĝo de la devoj — altrudataj de tiu solidareco — kun la prizorgo de l' individua intereso tute laŭrajta kaj natura, ne estas tiel malfacile starigebla, kiel oni kredas.

El “edukado bazita sur Scienco” de LAISANT  
(el franca lingvo tradukita)

## Nova Lernejo de Max Tepp

Daŭrigo (I)

### 3a ĉap. Instruado — Ĝenerala edukado

Se oni konsideras nur la sumon da instruitaĵoj ni trovos nenion enviindan ĉe malnova lernejo. Estas verdire

“la substanco mem de l' edukado, kiun ni deziras malsama je tio, kio ĝi estis ĝis nun. Antaŭe oni devigis la infanojn lerni tion: geografio, historio, fiziko, matematiko. Por alceli oni uzis vice premojn kaj frandaĵojn kaj oni ankaŭ uzis *metodojn* (verajn ŝercaĵojn). Tiun konjaĵaron pene akiritan, la lernanto uzis absurde kaj malbone ĉar ĝi ne estis *kredita* de li, ĝi ne estis *esenca* por li.”

Kial nin okupi pri geografio, matematiko, kemio k.t.p.? Ĉar ni esperas tiel atingi la esencon de ĉio, la nuran kaj finan leĝon, kiu nin regas.

“Do, se ni nin okupas ĉe nia lernejo pri scienco, ni tion faras nur celante tion: esto de ĉio, esto de l' kuŭvivo, senco de l' komuneco ŝtata ideo. Lernejo tiel laboras por starigo de l' komunuma societo.”

Do instruado donata ne por tiu instruado mem, sed por plifaciligi la rilatojn de homo al homo farante unue “homojn”.

### 4a ĉap. Praktika vivo

Sed ĉu tia edukado ne malsuperigos niajn infanojn en la nuna socio?

“Ni mem nin demandis pri tio en nia konscienco. Ni batalis longe kontraŭ ni mem antaŭ eniri la vojon elektitan. Ni povus iri laŭ la malrekta vojo de l' reformoj, kompromisoj, sed ni venis al plena fakto.

Ni devas posedi puran koron se ni volas eduki niajn infanojn. Ni devas cedi nenion al praktika vivo kaj al ĝia malvirteco. Ĉiu reformo estas akcepto de tiu malvirteco . . . .”

Tepp poste vidas kiel infano anstataŭ esti en malsupera stato rilate al vivo estas pli potenca ĉar:

“knabo fiplena je scienco, pensas, ke ĉio estas necesa tiel kaj sin lasas meti en situacion, kiu al li apartenas laŭ lia *scio*, sed niaj lernantoj scias mem kion al li apartenas. La manoj de niaj lernantoj estas estritaj de l' koro kaj cerbo; ili ne estas sklavaj antaŭ maŝino.”

“Ni vidas ke okuloj malfermiĝas por animaj faktoj. Tie la lernantoj, kreas kaj laboras: tie teatro estas elfarita, muroj estas ornamitaj, unu ekfaras breton, alia rakontas okazintaĵon . . . .”

Kaj al tiuj, kiuj ne estas konvinkitaj pri la praktika valoro de Nova Lernejo la instruantoj diras:

“Se via filo ne havas forton por esti pioniro de l' nova tempo ĉu vi volas ke li vivu en kompromiso kaj mensogo kaj ke li eraru kiel aliaj. “Ĉu vi volas tion? . . . .”

(1) Vidu sur la maja numero

## 5a ĉap. Instruado

En tiu ĉapitro Tepp registras kelkajn kritikojn de malamikoj de Nova Lernejo. Pensu do! Tage la infanoj, sub bonvola rigardo de l'instruantoj dancis "bolŝevikan dancon."

Pri tio "vi serĉas valoron de l'fakto en danco mem, kie ĝi ne estas. La gravega intereso estas pli certa en tio, ke knabo trovas okazon por montri kaj doni ion al komunuma socio de knaboj kaj ke li havu plezuron pro tiu donaco de sia animo."

La verkinto vidigas fakte al ni la infanon, kiu post ŝanceliĝo ekdancas bolŝevikan dancon. La dancanto estas baldaŭ alifigurigata komprenante, ke li donas plezuron al la aliaj.

"Ĉefas, ke infano sentu kiel li valoras por socio kaj kiel homoj ĝojas pri lia ekzisto. De tiu momento la infano faras vivan laboron, kiu servas al komunumo."

La infanoj ankaŭ sin okupis per ludkartoj. La instruanto respondas:

"Mi komprenas, ke ili povus sin okupi pri plibona ludo. Sed mi ne povas ĝin malpermesi ĉar tio ekvidigus, ke maturaj personoj faras mem malvirtajn agojn per tiuj ludkartoj."

"Fine la infanoj legis malmoralajn librojn. Mi kredas, ke estas krimo senigi infanojn je tiu eduko de respondeco. Estas maloportune malpermesi al infanoj, precipe per cenzuro aŭ polico, skribaĵojn, kiujn ili ne estas kapablaj juĝi . . . ."

"Nu! . . . . estas necese, ke junuloj kontentiĝu per bona literaturo.

Gejunuloj ne havas malsaton por legado, ili havas malsaton por vivo. Kial ne permesi al ili tiun vivon mem? Kial? Ĉar tial nia memvivo ne estus sendanĝera. Kiam junuloj vere vivas, falas nia kvieto. Lasu infanoj alkuri aventurojn kaj ili ne tiujn aventurojn serĉos en libroj. Marŝi, kuri, tia devas esti ilia vivo kaj estu certa vi, ke ili ne deziras anstataŭigi tiun vivon per malmoralaj legadoj."

"Sed ni tion timas ĉar por tio ni neniam devus kaŝi nian malvirtecon post nia aŭtoritato. Ni ne kuraĝas lasi liberecon al gejunuloj: ni al ili lasas nur permesojn."

"Ni timas tiun liberigan gejunularon kaj ĝian novan vivprincipon. Estas en ni mem ke ni devas batali.

"Virta libro sola ne faras virtan homon. Ke mi plivirtiĝu, tio ne dependas de la libro legata sed kiel mi ĝin legas kaj de la volo por plivirtiĝi." -

## 6a ĉap. Homo

Estu *homoj*: elformu *homojn*. Estas ja la plej certa pero por prepari Revolucion.

"Mi komprenas kaj ni ĉiuj komprenas ĉiutage plie, ke la laboristoj estas instigitaj alkonfesi pli kaj pli la penson: "Mi ne estas sufiĉe sperta por preni en manojn la malsimplan funkciadon de l'moderna ŝtato. Ni havas nenian sciencecon.

Tamen "Kiu do observis kiel popolo marŝis al abismo? Ĉu scienculoj? Ili skribis traktatojn pri Milito de l'Rajto! Ĉu komercistoj? Ilia komerco sukcesis kaj ili estis kontentaj! Kion do gravis por ili mortigitoj kaj ĝenerala mizero? Ĉu fine ekleziularo tion vidis? Ne! Ĝi preĝis germanan dion, kiun ĝi mobilizis kontraŭ franca dio!"

"Tion vidis ja la manlaboristoj, pretenditaj senscienculoj, kiuj malgraŭ la konservema lernado, enkondukis esploron, malfermante la vojon de l'nova tempo. Kial? Ĉar tiuj homoj, malpli difektitaj de intensa lernado, vidas ankoraŭ per sia klara saĝo. Ili diras: "Ni ne devas vivadi tiel; estas necese ke nia tuta vivo ŝanĝiĝu. Tiuj homoj ankaŭ havas naturajn intuiciojn, ke ne estas eble por homoj mortigi samulojn, ke ne estas justa se homa laboro — kiun ili faras por komunuma socio, por ŝtato estus taksita malsame, ĉu estu masonista laboro, ĉu estu komercista laboro. Ili ankaŭ pensas, ke kapitalismo ne devas havi potencon kontraŭ homoj. La sento de l'laborista klaso diris al ili: Aliformigi tion estas necese . . . . kaj ilia pugno kreis novaĵaron . . . ."

Laŭ ĉiuj vidpunktoj instruado, kiun oni ĝis nun donis estas malutilega.

"Konfuzigu tiujn, kiuj gloras sian edukadon, siajn ekzamenojn, sian scienccon alte pagatan. Komparu ilin kontraŭ la homo, kiu nur volas esti bona kaj kiu devas esti bona."

"Oni devas ankaŭ elmontri al gepatroj ne plu mi-regi antaŭ *sciencaro*. Ili kuraĝiĝu diri sincere: "Mia saĝo diras al mi tion kaj tion ĉi!" La kunlaborado de instruantoj kaj gepatroj estas do necesa ĉe Nova Lernejo.

Ĉu ĉiuj gepatroj ne jam komprenis la trafpovon de tiu nova edukado, ilia konfido estas malgraŭ tio ĝenerala kaj tio esperigas la sukceson pli kaj pli fortan de Nova Lernejo.

— Fino

## Lasthore

Ni ricevis de la Kongres-Komitato la jenajn komunikojn:

1) La nombro de aliĝintoj superas jam 130, el 14 landoj;  
2) La aliĝantoj estas petataj senprokraste sciigi: a) la daton kaj horon de sia alveno en Frankfurt; b) kiom da tagoj ili restos en la urbo; c) kian ĉambron kaj liton ili deziras.

3) Kriminalpolicisto esplordemandis la Prezidanton de la Frankfurta Grupo, K<sup>do</sup> H. Frickart, por ekscii ĉu vere la "Satanoj" estas danĝeraj komunistoj, kiel denunciis la Dresdena Polico."

Pri tiu lasta komuniko ni hodiaŭ nur aldonu jenon: Estis simple nur malicbuŝuloj, ti-kiuj asertis, ke la esp. policistoj ne estas bonaj "samideanoj". Tio certe estas nevera. La sinteno de la Dresdenaj esp. policistoj kontraŭ nin, pruvas tre klare, ke tiuj "samideanoj" ege deziras la sukceson de esp-o en revoluciaj rondoj. Por akceli nian movadon, ili "inteligente" uzas la solan rimedon de ili uzindan: la persekuton.

Daurigu estimataj "samideanoj". Ni tre dankas . . . . Unu konsilon: Se vi vere deziras grandan sukceson al nia Kongreso, nu, klopodu por ke la germana registaro malpermesu ĝin. Povus okazi por nia propagando nenio pli trafa . . . — Red.



## Internacia Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejo

Genevo 18—20 Aprilo, 1922.

El diversaj raportoj jam publikigitaj ni eltiras la jenajn faktojn, treege uzindajn de niaj varbistoj:

Ĉeestis 91 delegitoj, venintaj el 28 landoj; 14 reprezentis registarojn, la aliaj ĉu lerneajn aŭtoritatojn urbajn aŭ provincajn, ĉu asociojn de instruistoj. Dum la diskutoj nur esp-o estis uzata.

La delegitoj interkonsentis pri la jenaj punktoj: 1) Esp-o igas pli viva kaj interesa la lecionojn pri geografio kaj historio, ĉar la infanoj helpas al la dokumentado de la lecionoj per kolektado de poŝtkartoj ilustritaj, desegnaĵoj kaj leteroj, kiujn ili ricevas de eksterlandaj korespondantoj; 2) tiu letera interrilatiĝo trans la landlimoj vekas amikajn sentojn por la eksterlandanoj; 3) esp-o faciligas la lernadon de aliaj lingvoj; 4) ĝenerale du lecionoj posemajne dum unu jaro sufiĉas por lerni la lingvon.<sup>(1)</sup>

Rilate la disvastigon de esp-o en publikaj lernejoj S<sup>o</sup> M. Nikolaief, teknika konsilanto de la bulgara delegitaro ĉe la *Ligo de Nacioj*, raportas, ke esp-o estis enkondukata en la instruada programo per leĝa dekreto (artikolo 143 de la leĝo pri lernejo voĉdonita en 1921). Esp-o estas jam instruata en 25 gimnazioj al 784 gelernantoj. La ŝtato instruigas esp-on al estontaj instruistoj ĉe la Instruista Instituto en Sofia.

Pri Ĉeĥoslovakio, laŭ S<sup>o</sup> Friedrich, delegito de la Ministerio por Instruado, ministra dekreto enkondukis la nedevigan instruadon de esp-o depost 1921. Nune ĝi estas regule instruata al 450 lernantoj en 15 unuagrada lernejoj, al 325 en duagrada kaj al 40 en profesia lernejo.

D<sup>o</sup> Dietterlé, delegito de la germana Ministerio por Internaj Aferoj, raportis, ke esp-o estas jam enkondukita en la unuagrada lernejoj de 44 urboj, en la duagrada de 9 urboj, en la komercaj kaj teknikaj lernejoj de 13 urboj kaj en la vesperaj kursoj de 35 urboj. Proksimaŭtune ĝi estos enkondukata en la lernejoj de 51 aliaj urboj. En la germana Respubliko nun 600 instruistoj instruas esp-on.

En Nederlando, laŭ S<sup>o</sup> Sevenhuijsen, delegito de la Ministerio por Instruado, esp-o estas instruata en 95 urboj al proksimume 1500 lernantoj, 250 instruistoj povas ĝin instrui.

La deviga instruado de esp-o okazas en la Ĝeneva kantono de Svisio, en la sepagrada lernejoj: 13 klasoj, 400 lernantoj.

Pri aliaj landoj precizaj faktoj ne estas haveblaj en la raportoj.

1) Notinda ankaŭ estas la jeno: Por Ĉino, sesjara lernado estas necesa por scipovi la anglan lingvon; sepjara por la francan; okjara por la germanan; dekjara por la rusan kaj nur dujara por esp-on.

### Gravaj sciigoj

Januara-Aprila n-roj ne plu estas haveblaj. Plue, mi atentigas la G. L. A.-anojn kiuj ricevos, de Julio, S. R. pere de la Asocio nur bezonas pagi la membrotizon al S. A. T. ankaŭ ni akceptas pli — presfondo ankaŭ ekzistas por ĉiuj.

Adresŝanĝojn tuj sciigu al mi por eviti malnecesajn afrankelspezojn.

Richter — Leipzig.

## Diskutejo

Pri letero publikigita en la maja n<sup>o</sup> ni ricevis la jenan respondon:

Kara Kamarad-Redaktisto!

Ĉar "Londona Diablo" (ke li uzu sian diablecon por progresigi Komunismon) opinias, ke mi intence faris miajn rimarkojn pri la Londona Klubo por doni malveran impreson, mi devas klarigi, ke ili sekvis honteman konfesion, ke ĝis tiam mi neniam sukcesis varbi novajn anojn por S. A. T. kaj bedaŭron, ke estis malfacile malkovri samideanojn en la Klubo, pro malpermeso diskuti pri politikaj kaj religiaj aferoj.

Laŭ mia komunista vidpunkto, tiu neŭtraleco agas malegale, vidante ke nuntempe staras firme la sistemo, kiun la Komunistoj deziras forigi: kie oni fermas la buŝon pri politiko oni subkomprenate akceptas tiean sistemon.

Pri policestroj — Ĉu tiu diabla Komunisto ne scias, ke estas la devo de tiuj iri en la mezon de krimuloj, paroli kaj amikiĝi kun ili, kaj fine kapti ilin; ke ĉiu Komunisto estas iĝebla krimulo (se li laboras por la movado) laŭ la registara vidpunkto, kaj ke devo de policestro estas tiuokaze tute politika afero?

Plue, mi ŝatus demandi al Londona Diablo, ĉu la "Sankta Biblio" kaj la diversoj ne estas religiaĵoj, esperante, ne-esperante? Ĉu la episkopo ne valoris pro sia publika ofico, kiu estas nur religia ofico? Ĉu oni ne sciigis la Klubanojn pri lia metio? Kaj ĉu oni prezentus kontraŭreligiulon laŭ lia kontraŭeco: "Sinjoron, la faman Malkredulon"?

Londona Diablo opinias, ke oni gastigus en la Klubo kun sama varmeco la Reĝon de Britujo kaj Lenin. Mi opinias kontraŭe. Sed, eĉ se estus, kio okazus? La reĝo venus ne kiel simpla neŭtrala esperantisto, sed kiel grava registara pupo, kaj oni uzus lian politikan valoron por reklami la movadon: oni kantus "Dio Savu la Reĝon" kombinante tiamaniere politikon kaj religion. Pri Lenin — oni tute ne povus apartigi lin for de lia politika signifo; li nepre ne parolus kie la Komunistoj devas silentiĝi pri Komunismo; do la malkomunistoj de la Klubo ne necesas timi pro la minaco de Londona Diablo.

Tiu diskuto memorigas min pri rimarko, kiun faris kamarado en oficejo de "Workers' Dreadnought." Li diris: "Esperanto? Por mi, tute ne, ĉar mi vidas, ke tiuj Komunistoj, kiuj lernas ĝin fine iĝas nur esperantistoj." Ĉu estas iom da vereco (mi, kamarado, ankaŭ ŝatas la verecon) en tiuj vortoj? Ĉu la esperant-Komunistoj forgasas, ke la lingvo estas por ili nur ilo por pli rapide kaj facile starigi Internacian Komunismon? Ĉu la glavo estas tiom bela, ke oni malatentas uzi ĝin por batali?

Londona Satanino.

## Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue Boyer, Paris-XX<sup>e</sup>

### OFICIALA INFORMILO

**Celo:** Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

**Jarkotizo:** Laŭ valoro de unuhora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cend., k.t.p.

Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., abonanto 25 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).

\*

Ne longe daŭris la vento pro kies kvieteco ni plendis lastan monaton. Ree ĝi furiozas: 102 novajn membrojn ĝi alportis dum majo. Ni kuras grandpaŝe al 3<sup>a</sup> milo. Kaj la laŭroj de niaj unuaj

pioniroj tremetos pro la fervoro de kelkaj novaj varbantoj.

Fojon plian ni citu Leipzig kies grupo akiris ankoraŭ 7 adeptojn. Nun Vieno entenas 37 sennaciulojn (kun la 18 lastaj kiujn deklaris K<sup>do</sup> Zidek). En Troyes 5 novaj. — En Bremerhaven 3 varbitoj de K<sup>do</sup> Eckards Hans, — Düsseldorf 3, — Frankfurt 2, — Hamburg 4, — Budapest 4. — nia nelacigebla K<sup>do</sup> Köckeritz konvinkis 6 Dresden'anojn, — kaj K<sup>do</sup> Van Aelst 2 Bruxelles'anojn. En Mannheim 2, — Linz 2, (de K<sup>do</sup> Stöber). Nov-York portas 7 pluajn S. A. T.anojn (sume 15). Essen kaj ĉirkaŭaĵo 3, — Milano 1, Glasgow 1, Antwerpen 1, k. t. p. Multaj izoluloj. Ŝajnas ke nia movado firme disvastiĝas en Sofio, Plovdiv, Ferdinand k. c. urboj bulgaraj; ja, K<sup>do</sup> Panajot Kolev ĵus sendis 10 novajn aliĝojn.

*Respondkuponoj:* al tiuj kiuj uzas tiun pagmanieron ni sciigas, ke la respondkuponoj estas valoraj nur 2 monatoj post la aĉetdato. (6 monatoj por transmaraj landoj).

*Nia jarlibro:* al ĉiuj S. A. T.anoj pagintaj la 1922-jaran kotizon kaj nur al tiuj) ni sendis po unu ekzemplero de la jarlibro. Tiuj kiuj ne ĝin ricevis estas petataj sin turni al ni. En ĉiuj urboj kie troviĝas pluraj S. A. T.anoj ni uzis la bonvolon de iu membro kiu disdonis la jarlibron al siaj samurbanoj; tio por ŝpari pezan poŝt-espezojn.

*Skribu legeble!!* kaj precipe ne kripligu vian adreson per mallongigo aŭ "esperantigo". Ekz.: iu membro kies germanlingva nomo estas *Schumann* skribas *ŝuman!* Kial?

\*

Ni finas nian "informilon" kunigante nian voĉon al la plendo de la Kongreskomitato pro la malakurateco en la sendo de la kongresaliĝoj.

Kun ĝi ankaŭ ni esperas ke la Kdoj pristudos antaŭ la Kongreso la proponojn pri ŝanĝo de la Statuto.

1 Junio 1922

La sekretario de S. A. T.

Kun ĉagreno ni ekscias pri la morto de nia K<sup>do</sup>

## Urko Maja en Tampere

Senkompata ftizo lin trafis 20-jara.

La finnlandaj Kdoj perdas valoran pioniron. Li estis unu el la fondintoj de la Societo proletaria "Antaŭen". Estis li agema kaj sindonema kamarado, kaj amata amiko. Ni longtempe bedaŭros lian morton.

## KRONIKO

### Anglio

*London:* Aperis du artikoloj favoraj al esp-o en "Railway Review" (13an de Majo 22) oficiala ĵurnalo ĉiusemajna de la brita fervojista sindikato. La 1an de Majo en la Londona demonstracio estis parolado pri esp-o. Dum Pasko ĉe la ĉiujara konferenco de la I.L.P. (plej grava socialistpartio ĉi-tiea) estis proponata alpreni esp-on kiel oficialan lingvon por internaciaj kongresoj. Bedaŭrinde pro troa enhaveco de la tagordo nenia rezultato pozitiva estas atingita. — M.S.

### Bulgario

*Sofia:* Vigle laboras nia *Komunista Esperanto-Grupo*. Jam ĝi faris sufiĉe da bruo por altiri pri L.I. la atenton de diversaj komitatoj lokaj (partia loka sekcio, sindikatoj, junulara organizaĵo k. a.) kaj eĉ de la Centra Komitato de la Komunista Partio. Estas opinioj por kaj aliaj kontraŭ, sed almenaŭ ĉiuj pli malpli okupiĝas pri la demando. Mirinde fervore agadas la membroj de nia grupo, kelkfoje eĉ riskante kon-

fliktojn kun la koncernaj komitatoj. Inter la anoj estas lernantoj, mekaniklaboristoj, lignaĵistoj, poŝtovicistoj k. a. kaj ĉiu agas en sia medio. Belan perspektivon ni antaŭvidas.  
P. K.

### Hungario

*Budapest:* Okazis la 26- Februaro la jarkunveno de la IXa distrikta Grupo. La raporto de la Sekretario montras ke nun la grupo enkalkulas 153 membrojn. La plej alta membro-numero estas 203. La enspezo por la monatoj Marto kaj Aprilo sumis: 34 147 kr.; la elspezo: 19 198,07 kr. La Biblioteko posedas 128 hungarlingvaj librojn, 63 esperantajn kaj 137 esp. ĵurnalojn. La grupo petas pri alsendo de ĉiuj specaj propagandiloj. Ĉion oni sendu al *Adalberto Schuller*, Angyal-utca 18. I. 17, *Budapest IX*.



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

### Libroj kaj broŝuroj

*Esperanta Legolibro kaj Krestomatio de T. Chif* (1922) Eldonejo: "Verda Utopio", 5265, Uehommachi 7-chome, Minamiku. *Osaka* (Japanio). Formato: 13 × 19 cm, 253 pĝ., bindita. Prezo: sviz. Fr. 7,00.

La enhavo de tiu libro konsistas el 103 pecoj: anekdotoj, rakontoj, artikoloj, poeziaĵoj k. a. Plejparte el ili jam aperis en diversaj libroj aŭ revuoj. Kiel subskribintoj mi legis ofte la nomojn de *Zamenhof*, *Kabe*, *Grabowski* kaj aliaj ŝatataj esp. verkistoj. Sro T. Chif ankaŭ estas konata kiel aŭtoro de "Japanaj rakontoj", "Plena Esperanto-Japana vortaro" k. a. verkaĵoj. Tiuj referencoj ebligas, ke oni povu senhezite rekomendi la libron al japanaj lernantoj, kiuj deziras perfektigi en nia lingvo kaj kutimiĝi kun ĝia kvazaŭ klasika stilo.

Piedpaĝe troviĝas notoj japanlingve, celantaj klarigi kelkajn punktojn el la tekstoj.

La libro estas plaĉe eldonita. Domaĝe, ke antaŭ la presado ne estis tute forigataj la preseraroj. Tabelo da ili troviĝas sur aparta folio kaj tiel permesas korekti la erarojn, kiuj povos esti facile forigataj en alia eldono.

*Devoj de la homo de Giuseppe Mazzini.* El la itala lingvo tradukis *Mikaelo Arábano*. 1<sup>a</sup> eldono, 10 000 ekz. (1922). Eldonis: *Laborista Esperanto-Grupo*, via S. Luca, 4-2. *Genova* (Italio). Formato: 11 × 16 cm, 163 pĝ. Prezo nemontrita.

Ĉu plorinde, ĉu ridinde? Ĉu estas eble, ke nun, en 1922, *Esp. Lab. Grupo* povas interesiĝi pri tiaj kadukaj ideoj, kiaj estas tiuj de la fama itala patrioto? En epoko kiam la liberiĝo de kelkaj nacioj (ekz. Ĉeĥoslovakio) fakte montras ke tia liberiĝo neniel utilas al la ekspluatata klaso, estas vere plorinde, ke laboristoj povas ankoraŭ nutri sian spiriton per tiaj falsaj konceptoj. Sed ĉu ne estas ridinde, ke oni uzu sennaciecan lingvon por diskonigi naciecajn ideojn?

La idealo de Mazzini estas sendube tiu de la "facistoj", kiuj, kun sekreta helpo de la itala registaro, detruas la popoldomojn kaj dissemas teruron tra la tuta lando.

"Ne forlasu la flagon al vi donita de Dio. Kie ajn vi troviĝas... batalu por la libereco de tiu popolo se la momento tion postulas; sed batalu kiel Italioj, por ke la sango verŝota fruktoportu honoron kaj amon ne sole al vi sed al via Patrujo. Kaj estu Itala la pensado de viaj animoj. Italaj estu la agoj de via vivo..." ktp.

Ĉu plorinde, ĉu ridinde?

La demando pri la plibonigo de la Muzikskribo kaj ĝia solvo per la aŭtonoma Muziknotado de *L. Cogen*. Eldonita de "Belga Esp-isto", 45 Kleine Beerstraat, Antverpeno (Belgio). Formato: 14½ × 22½ cm, 8 pĝ. Prezo: Fr. 0,50 (2 respondkuponoj).

Ĉiuj interesigantoj pri novaj eltrovaĵoj legos kun intereso tiun broŝuron, kiu celas "diskonigi" la novan muziknotadon de *Sro J. Hautstont*, la eltrovinto de l' priparolita sistemo.

Provo de Stenografio Internacia laŭ la principoj de *Conen de Prépéau-Aimé-Paris*, esperantigita de *Alfred Lefebvre*. Formato: 13 × 21 cm, 8 pĝ. kun koverto. Prezo: Fr. 1. Havebla ĉe la esperantiginto: 23, rue Stephenson, Paris.

Laŭ noto presita en la broŝureto, tiu stenografia sistemo ebligas stenografii ne nur esp-on sed la sekvantajn lingvojn: angla, germana, franca, hispana, portugala, itala, holanda ktp.

La internacia lingvo kaj laborista klaso. Verkis *P. Kolev*; eldonis *Balkana Liberiga Stelo* str. Veslec, 10, Sofio (Bulgario). Formato: 12 × 16 cm, 64 pĝ. Prezo: 6 levoj.

La enhavo de tiu propagandcela bulgare verkita broŝuro estas ena: *Por la internacia lingvo; Esenco de la demando pri L. I. laŭ la komunista vidpunkto; al la internaciistoj* (letero de *H. Barbusse*); *Opinioj pri esperanto* (*Barbusse*, *Rolland*, *Gorkij* k. a.); *El la uzado de esp-o* (*S.A.T.* *Sennacieca Revuo* ktp.); *Esperanta Gramatiko*. El tio estas konkludeble, ke niaj Bulgaraj kamaradoj havas nun en manoj plej taŭgan kaj imitindan propagandilon.

Tri Angloj Alilande de *John Merchant*. Romano originale verkita en esp-o. Eldonejo: *Brita Esp. Asocio*, 17 Hart street, W. C. T. London. Formato: 12 × 18 cm, 62 pĝ. Prezo: 1 ŝ. 1 p. (5 resp-kup.).

La Karavano de *Wilhelm Hauff*. El germana lingvo tradukis *J. W. Eggleton*. Sama eldonejo kiel supre. Formato: 12 × 18 cm, 98 pĝ. Prezo: 1 ŝ. 8 p. (9 resp-kup.).

Unua Kurso Legolibro kompilita de *W. M. Page*. Sama eldonejo kiel supre. Formato: 12 × 18 cm, 24 pĝ. Prezo: 10 p. (4 resp-kup.).

## Prospektoj

Die Leipziger Mustermesse mit Technischer Messe und Baumesse. 16-paĝa bele ilustrita kaj lukse eldonita broŝuro tute en esp-o pri la printempa Foirio. Havebla senpage ĉe: *Messamt für die Mustermessen in Leipzig, Esp-o-Fako*, Markt 4.

## Gazetoj

La Vero (noj 1, 2, 3). Eldonas la anarkia grupo "La Vero". Adreso: Calçada do Monte, 87 Lisboa (Portugalia). Formato: 16 × 23 cm, 4 pĝ. Jarabono: 20 resp-kuponoj. En portugala lingvo kaj esp-o.

Norvega Esperantisto (noj 1, 2-3). Organo por "Norvega Esp. Ligo". Hektografita gazeto en norvega lingvo kaj esp-o. Adreso: *Sro M. Muribo*, Boekkelagshøgda (Norvegio).

Konkordo (noj 1, 2). Oficiala organo de Organizaj Grupo kaj Komitato de Sudslava Esp. Ligo, ktp. Hektografita gazeto 4-paĝa redaktata tute en esp-o. Adreso: *Zagreb*, Jezuitska 1 (Jugoslavio) ĉe *Sro Dušan Maruzzi*.

Memoroto. — 1) *Gazetoj tute en esp-o*: Esp-o Triumfonta (80, 81, 82, 83, 84, 85), Esperanto (4, 5), La Progreso (4), Hungara Esp-isto (4), Esp-ta Finnlando (1, 2, 3, 4), Espero Katolika (127, 128), Katolika Revuo (2), Katolika Mondo (8, 9), Espero Teozofia (3), Hispana Esp-isto (56), Export Esperantist (4), Verda Utopio (2, 3), La Unuigita Tuthomaro (Mart-Aprilo).

2) *Esp. Gazetoj Dulingvaj*: The British-Esp-ist (205, 206), Kataluna Esp-to (4, 5), Bulletin pour la propagation de l'Esp-o (3), Arguso (7), Bulgara Esp-to (7), La Revuo Orienta (2, 3, 4), Informa Bulteno (1, 2), La Verda Ombro (1), Marto (4-5), Amerika Esp-to (5), Esp-to-Praktiko (4), Belga Esp-isto (3-4), La Espero (4), Der Arbeiter-Esp-ist (5), L'Esperanto (3, 4), France Esp-to (5), Germana Esp-isto (4-5), Bizantio (7-8), La Semisto (3), La France Postale Esp-te (4).

3) *Idistaj aŭ mondlingvaj*: Mondo (4), Linguo Internacia (4, 5), Suisian-Idisto (5), Libereso (4), Bulletin Français-Ido (41-42, 43-44), La Feuille (5), Esperantida (3, 4), Kosmoglott (3, 4), L'Amiko Idista (14), La Moderna Edukisto (2).

4) *Enhavantaj priesperantajn artikolojn aŭ tradukaĵojn el esp-o*: Ecole Emancipée (28 ĝis 35), L'Étincelle (15, 18, 19, 2), Le Drapeau Rouge (31, 32), Le Syndicaliste des P.T.T. (152 ĝis 159), Preskaŭ en ĉiu n° enhavas artikolojn pri esp-o de *kdo P. Filliâtre*; L'Arac (9), Por esperanta artikolo de *J. Mazenod*; Le Neo-Naturien (4), Le Sincériste (5), L'Emancipateur (18, 19), A Comuna (83, 84, 85); En la n° 85, poriesperanta artikolo de *Francisko Costa*; Eugenia (15), Represas tradukon de la artikolo pri "La

Kaverno de Zarathustra" aperinta en *S. R.*; Nova Sociedade (4, 5), Represas tradukon de la sama artikolo; Norsk Bokbinder-Tidende (6, 8), Esp-oFako; La Voĉo Komunista (16, 18), Trafaj artikoloj pri *S.A.T.*, tradukoj ktp. de *Satano*; Sociální Democraie (16), notoj pri *S.A.T.* kaj la kongreso en *F. a.M.*; Delnické Listij (14), Notoj pri *S.A.T.*; Solidaridad Obrera (206); Voluntad (4, 5), priesperantaj artikoloj de *kdo Sesé*.

5) *Diversaj*: El Naturista (4, 5, 6), Freedom (394, 395), A Voz da Mocidade (1), La Vie d'Outre Tombe (7, 8), La Muse Rouge (2), Savoir (25), Bulletin officiel de la Société d'étude documentaires et critiques sur la guerre (1). Adreso: 8, rue Stanislas, Paris (8); La Bataille (37), Le Mutilé (43), Publications de "La Revolte" et "Temps Nouveaux (11, 12, 13).

## KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpreso, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr. Dek-du enpresoj, 6 fr.

Por kurzsufierantaj landoj 1/3 da aktuala horsalajro.

MALLONGIGOJ: L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-aĵo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

### Belgio

*Kdo Léon Bergiers*, 11 Rue Lauwers, La Hulpe (Province de Brabant). L, PK, k. ĉ. l.

### Bulgario

*Kdo Vasil K. Tabakov*, str. Aprilov 4, Gabrovo, kun gekamaradoj L, PI, PK, k. ĉ. l.

### Ĉeĥoslovakio

*Kdo Antoni Rend*, vilao "Kukacka", Plzen-Letna, (21 jara). Pri social. lab. movado, pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

*Kdo Rudolff Tentura*, vilao "Kukacka", Plzen-Letna. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. gesamideanoj.

*Kdo Francisko Tamásek*, Riegerstrato 187, Plzen-Letna. k. ĉ. l.

*Kdo Alois Dolejší*, Havličekstr. 129, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Tachav Trla*, Jungmanstr. 264, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Eduard Stupka*, Jungmanstr. 130, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Jaroslav Brejcha*, Jungmanstr. 106, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Francisko Kalmy*, Jungmanstr. 11, Plzen-Lobzy. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Tilhem Prexl*, Jungmanstr. 13, Plzen-Lobzy. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Adalbert Martinek*, Ejporiee n° 55 apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Taclav Liška*, Bukoveč n° 56 apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Taclav Fišer*, Nyrany n° 320 apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

*Kdo Francisko Jukl*, Cervené Poriči n° 34 apud Šrihov. Pri nat. belecoj kaj interŝ. PK, L, k. ĉ. l. gesamid, ĉiam resp.

*Kdo Antonio Zanela*, Nyrany 127 apud Plzen. Kun edukistoj de poŝtkolomboj, interŝangas PM, k. ĉ. l. precipe Francio (Paris) ĉiam resp.

*Kdo Mikael Meiner*, (Burĝa bierfabriko), Plzen. Pri vivrilatoj naturaj belecoj k. ĉ. l. gesamid.

*Kdo Josef Nosek* (biermaltfaristo) en Mirošov n° 64 apud Rokycany. Pri natur. belecoj kaj turismo k. ĉ. l. fraŭlinoj.

La parteprenontoj de l'gimnastfesto en Leipzig notu ke la esp-istoj kunvenos lundon la 24. 7. en la popoldomo.

Kdo *Tachav Todicka*, (Mestansky pivovat), *Plzen*. Sama temo kiel supre.

Kdo *Mikael Mathauser*, Irhanov n° 62 apud *Domazlice*. Kiel supre.

Kdo *Jan Petera*, Obora n° 38 apud *Ostromer*. Kiel supre.

Kdo *Josef Sluka*, Schiesglock, poŝto *Potscherad* apud *Postolopr.* Kiel supre.

Kdo *Jakob Sejkot*, Zalez ly p. Malenice apud *Tolyne*. Pri naturaj belecoj k, ĉ. l.

Kdo *Francisko Stalder*, Svarko n° 18 p. Letiny apud *Blovice*. Sama temo kiel supre.

Kdo *Tachav Rainer*, Drahlín p. Obcenice apud *Prilam*. Kiel supre.

Kdo *Jarko Tondraček*, Červéne Pečky apud *Kolín*. (19jara.) Pri arto muziko, k. ĉ. l., fraŭlinoj.

#### Francio

Kdo *Ehm Marcel*, 43 rue des Batignolles, *Paris 17e*, L, PK, PM, k. ĉ. l.

Kdo *Spego*, poŝtrestante *Puteaux Seine*. Fraŭlo laboristo dez. fraŭlinon por komunisme vivi, malseriozulino sin detenu, skribi.

Kdo *André Rougeault*, 10 rue des Béguines, *Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Royer Livet*, 15 rue Traversière, *St Jean, Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Albert Tanguy*, 27 rue de la Couronne, *Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Henri Courtois*, 22 rue des Petites filles Dieu, *Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Marcel Potnisky*, à *Lèves* près *Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Jean Frénais*, 32 rue des Petites filles Dieu, *Chartres*, Eure et Loir. PI, k. ĉ. l.

Kdo *Bartelmy E.*, 3 rue Moulin, *Saint Denis (Seine)*. k. ĉ. l. pri politiko, komunismo, socialismo ktp.

Kdo *Jamois E.*, 3 rue Moulin, *Saint Denis (Seine)*. k. ĉ. l. pri komunismo, sindikatismo.

Kdo *François Hiltbrunner*, 12, Cité Robert, *Troyes (Aube)*. L, PI.

#### Germanio

Kdo *Josef Pfättisch*, Pionierübungsplaco B. M. 2, *Ingolstadt*. L, PI, PK, k. ĉ. l.

Kdo *Paatz Gg.*, Hahnstr. 53, *Stuttgart*. Serĉas gekoresp. por 20 gejunuloj pri ĉiuj laboristemoj.

Kdo *Paul Lang*, Cramerstr. 23, *Schweinfurt*.

Kdo *Leo Weimann*, Maininsel 8, *Schweinfurt*.

Kdo *Heinrich Bumm*, Pödeldorfer Str. 39, *Schweinfurt*. Ĉiuj deziras koresp. k. ĉ. l. per L. I. aŭ P.

#### Rusio

Kdo *Bazilo Averin*, 6 ur 3 Bakald N 30, *Astrakanj*. L, PK, pri ĉio, ĉiam resp., interŝanĝ., PM.

Kdo *Jurij Varancin*, Mironosiercaja sr. d. N. 9, *Nijnij-Novgorod*. PK, k. ĉ. l., krom Rusio.

Kdo *Konovalov Hermann*, Teatralnaja pl. 6, 9, *Nijnij-Novgorod*. PI, pref. revoluciaj aŭ kun vidaĵoj de teatroj, esp. gaz.

Kdo *G. Artemjeo*, Armjanski most, 111, *Astrahan*. k. ĉ. l., pri socialismo, politika kaj socia vivo, PK, PM, L, interŝanĝas papermonon.

Kdo *A. Aŭgustin*, F. Engels str 16, 79 U<sup>a</sup> Hospitalo, *Voronej*. Interŝanĝas PM, kontraŭ jurnal. kaj libroj, L., PI.

#### Svedio

Kdo *Adol Herlin*, Vardskolmen 16, *Sodertaje*.

Kdo *Klas Hultkvist*, Träsgardsgat 12, *Jönköping*. PI., PK.

Kdo *Einar Lundin*, Södra Salho 6, *Jönköping*. k. ĉ. l. kamaradoj.

*Sveda Laborista Esp-o Asocio* deziras ricevi ĉiuspecajn socialistajn esp-reklamajojn; adresu al kdo *Einar Adamson*, Brynäs 30, *Gefle*.

## „Esperanto Triumfonta“

Internacia, universala kaj sendependa estas  
unua kaj sola Esperanto-ĵurnalo  
eldonata ĉiusemajne, en granda formato  
(31 × 48 cm) de profesia gazetisto  
presata en propra presejo

Plej rapida informado Tekstoj nur en Esperanto  
Modela laŭfundamenta stilo

Petu senpagajn specimenojn de la eldonanto:

sro TEO JUNG, Köln-Horrem

(Kolonjo, Germanio)

Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo (Pollando) liveras ĉiujn  
esp-ajn librojn, serĉas interrilatojn kun aliaj eldonejoj.

Vi pri l'Lando Matensuna,  
Pri l'popol' en tempo nuna  
Kaj antikva volas koni?  
Nu rapidu tuj aboni —

## LA REVUON VERDA UTOPIO

Monata — Ilustrata

Redaktata nur en Esperanto  
Pri japanaj literaturo, arto, moro, socia vivo, k. t. p.

ABONO

Jare: eksterlande Yen 1.70; enlande Yen 1.50; helpabono  
jare Yen 5.00

5265, Uehommaĉi VII, Minamiku Osaka Japanujo.

## Aĉetu!

10 belegajn diverskolorajn poŝtkartojn kun teksto reklama  
pri la 2<sup>a</sup> Kongreso de S. A. T. Ili estas haveblaj por 3  
respondkuponoj (10 M. por germanoj) ĉe Kdo *Kempinski*,  
Kronprinzenstr. 17, *Frankfurt a. M.*

## Pro manko de loko

Devis esti prokrastataj la jenaj jam kompostitaj artikoloj: “La nekoneblo de Spencer”, de *R. A. Fanta*; “En la Tero”, traduko de *Marc Elbo*; “En kvazaŭfilozofia kampo”, de *Liber*; “Unu el la Reĝoj de Respubliko” (sekvo), de *Maksim Gorkij* kaj diversaj notoj. *La Presisto.*

## Leterkesto:

*A. R. New York*: Via poemeto povus aperi en iu ajn burĝa gazeto: Ĝi havas nenian sennaciecan karakteron. Ni resendas la manuskriptojn nur se oni aldonas la poŝtelspezojn.  
Fratece — Red.